1987 marto
80a jaro
n-ro 975 (3)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

La naskiĝlando de Esperanto gastigos vin!



Kalendaro de la Jubilea Jaro

Vi trovos,

ke esti esperantisto foje postulas esploristan kompetenton. Sur kvar paĝoj de ĉi tiu numero kuŝas kalendaro tiel labirinte amplekса, ke eĉ ni mem emas perdiĝi en ĝi. Tial, sur aliaj kvar paĝoj vi trovos artikolon, kiu provas mapi almenaŭ kelkajn el la plej larĝaj vojoj tra la ĝangalo. Kaj kio pri la ĉirkaŭanta flaŭro kaj faŭno? Nu, ĝi plejparte (fakte preskaŭ ekskluzive) eŭropas, kio montras aŭ timemon aŭ rarecon de ekstereŭropaj specioj. Post cent jaroj, nia movado restas tutmonda nur aspire, almenaŭ laŭ spuroj troveblaj sur la paĝoj de ĝia centra organo. Aldoniĝas atesto de la membrostatistiko por 1986, sur p. 59 — kies rekorda sumo cetere montras, ke tamen la afero progresas! Ni akceptu la defion tie starigitan je duona centmilo, kaj turnu nian atenton aparte al la mondo ekster Eŭropo, kies Jubilea Jaro ankoraŭ ne plene reprezentiĝas ĉi-numere. Ni ne povas bridi nin de mencio, ke koviĝas tiukampe mejloŝtona organiza paŝo, kies publikigo en baldaŭa numero de nia revuo estos vera novaĵo de la jaro...

Enhavo

La centjara jubileo de Esperanto

41 Kongresi en Pollando (Mark Fettes)
42 La kongresejo de la 72a UK: Pli ol 30 jarojn la fokuso de Varsovio
43 Kun kaj por junularo en Bydgoszcz
44 Varsovio 1887 (Andrzej Pettyn)
45 Intervjuo kun Roman Dobrzyński: Fidi je la forto kaj saĝo de la Esperanta popolo
48 La Centra Oficejo jubileas, per juna vervo kaj veterana lerto (Osmo Buller)
50 Elstaraj eventoj de la Jubilea Jaro
52 Kiel senbariligi Esperanto-kongresojn (R. Kent-Jones)
54 La Jubilea Kalendaro
58 Fake; Nekrologoj
59 La membraro de UEA en 1986: Unuafoje super 40 000!
60 Oficiala Informilo

La kovrilo

La kastelo Wawel kaj katedrala turo, en Krakovo, atestas je la daŭremo kaj forto de la pola nacio, kiu fenikse renaskiĝis fojon post fojo en sia tumulta historio. Lastatempe la historio de la pola Esperanto-movado fariĝis simile tumulta. Ni do ne miru, ke la poloj montris sin kapablaj solvi siajn problemojn propraforte, laŭ priskribo en nia intervjuo sur paĝoj 45-47. Ja temas pri nacia talento — samkiel la fama pola gastamo, kiu atendas vin ĉi-somere en la jubilea kongreslando. Pli pri tio en niaj unuaj paĝoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telekso: 23721 UEA NL; **Telegramadreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo varias laŭlande (gld. 44,50; US $ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p.150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.
Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.
Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.
Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.
Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.
Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.: tel. (1) 316-423.
Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.
Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.
Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 975 (3), maart 1987. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

La Granda Teatro kaj "Nike", du simboloj de Varsovio.

Kongresi en Pollando

Jen: por la jubileo de Esperanto ĝiaj adeptoj revenas al la fonto. Al la lando, tiutempe ne ekzistanta krom en la mensoj kaj koroj de sia popolo, kiu helpis nutri la animon kaj fiksi la karakteron de la juna Zamenhof. Multo ŝanĝiĝis en cent jaroj; sed sub la surfaco de la moderna ŝtato ankoraŭ restas la kulturaj kaj intelektaj tradicioj kiuj, filtritaj tra la juda familia fono de nia "iniciatoro", naskigis lian genian infanon. Kion el ili rimarkos la ĉi-jara kongresano, alteriĝinta en Varsovio el trajno aŭ aviadilo, antaŭĝuanta sian restadon kaj scivola pri la lando, kiu dum unu semajno fariĝos efektiva Esperantujo?

Eble unue impresos lin la fizika medio. En Varsovio temas pri urbo, kiu renaskiĝis el postmilitaj ruinoj: parte kun brila sukceso, ĉar en la rekreo de la t.n. "Malnova Urbo" kunlaboris artistoj kaj arkitektoj, utiligante eĉ la verkojn de Canaletto por rehavi impreson de la antikva kvartalo. Ĉie en Pollando oni trovas tiajn spurojn de la pasinteco kiun konis Zamenhof, savitajn el du mondmilitoj kaj ankoraŭ amatajn de liaj posteuloj. Ĉirkaŭ ili — tiuj domoj, kasteloj, preĝejoj kaj stratoj el la malnova tempo — etendiĝas la simboloj de la malfacila nuno: betonaj skatoloj konstruitaj nek por plaĉi al la okulo nek ĝojigi la koron, sed tutsimple por subtegmentigi la preskaŭ 40 milionojn da polaj civitanoj. Pollando ja ne havis la ekonomiajn rimedojn lastatempe por prizorgi luksaĵojn, kaj ofte la okcidenta vizitanto sentas, ke temas pri evoluanta lando hazarde lokita en Meza Eŭropo.

Kulture kaj intelekte, tamen, la poloj ne allasas dubojn pri evoluinteco aŭ firma aparteno al la eŭropa fluo de la tutmonda kulturo. Simpla listigo de nomoj sufiĉas: Mikołaj Kopernik, Frederiko Chopin, Maria Skłodowska-Curie, la anglalingva verkisto Joseph Conrad (Teodor Korzeniowski), Ignacy Paderewski, Henryk Sienkiewicz, lastatempe Nobel-premiito por literaturo Czesław Milosz... Ankaŭ multaj el la plej brilaj pioniraj esperantistoj estis poloj: ekz. Antoni Grabowski (tradukis i.a. *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz, ankoraŭ unu el la pintaj verkoj en nia literaturo), Kazimierz Bein (Kabe, fama pro *La Faraono* de Boleslaw Prus kaj aliaj majstraj tradukoj), kaj kompreneble Zamenhof mem, kvankam unualoke hebreo. Ĉi tiu plurcentjara kultura fono saturas Pollandon ankoraŭ hodiaŭ, kaj nia kongresano certe sentos ĝin ne nur en la riĉaj kongresaj programoj, sed kvazaŭ en la aero ĉirkaŭ si, en la kasteloj kaj la preĝejoj, ŝvebanta tra la stratoj kaj super la vastaj polaj kampoj.

Kiel alia aspekto de tiu intelekta heredaĵo, se nia kongresano trovos okazon paroli kun siaj polaj gastigantoj (kaj por kio taŭgas internacia lingvo, se ne por paroli?), frapos lin ilia malfermeco, ilia preteco diskuti pri kio ajn. Ĉiuj ni havas iun impreson, iun scion pri Pollando antaŭ ol iri tien; por multaj, plej fortaj estas la bildoj el la lastaj jaroj — preskaŭa ekonomia kolapso, politikaj konfliktoj, milita stato. Sed nepra parto de la Esperanta etiko estas la graveco de propraj spertoj, de rekta parolado kun la homoj mem, finfine de ioma malfido al ĉiuj eksterlandaj raportoj. Iri al Pollando signifas lerni senpere pri la etoso kaj sanstato de la lando kaj ĝia popolo. Nia kongresano eble surpriziĝos trovi, ke iuj antaŭjuĝoj estis falsaj (kiel antaŭjuĝoj kutime estas)... kaj ĉu tiaj spertoj ne en si mem indas la vojaĝon?

Laste kaj plej certe, dum lia tuta restado la kongresanon impresos la gastamo de la poloj — kvalito

fama jam de jarcentoj. Kiel diros artikolo en la ĉijara Kongresa Libro, en Pollando "estas nekonata la fenomeno de ksenofobio — malamo aŭ malamikeco rilate al eksterlandanoj." Dum sia tuta historio la poloj frotis kubutojn kun aliaj nacioj, foje ne propravole, tamen ĉiam adaptiĝante al la situacio. Tiel ili kvazaŭ realigis unu el la bazaj principoj malantaŭ Esperanto: ke homaj kontaktoj kaj homa amikeco povas kaj devas spiti politikajn, kulturajn kaj aliajn barojn. Ankaŭ vi spertos tion, kadre de la plej granda kongreso de Esperanto iam ajn realigita. Do venu, esperantistoj: Pollando invitas!

Mark Fettes

Dekstre: *Ne Bydgoszcz, sed Krakovo kun perspektivo de la rivero kaj kastelo Wawel. La dua urbo de Pollando gastigos la Internacian Junularan Kongreson en julio.*

LA KONGRESEJO DE LA 72a UK

Pli ol 30 jarojn la fokuso de Varsovio

Preskaŭ ĉiu urbo havas sian karakterizan konstruaĵon, kiu iel distingas ĝin disde la aliaj. En Londono estas la parlamentejo, en Parizo — la turo de Eiffel, en Varsovio — la Palaco de Kulturo kaj Scienco. Kaj kvankam ĉi tiuj menciitaj konstruaĵoj estas konstruitaj en diversaj periodoj, ili fariĝis jam kvazaŭ simboloj de ĉi tiuj urboj.

La Varsovia Palaco troviĝas en la centro de la urbo. Oni malfermis ĝin en 1955, sed la junaj loĝantoj de Varsovio estas certaj, ke ĝi situas en la urbo de jarcentoj.

Dum ĉi tiuj pli ol 30 jaroj la varsovianoj amikiĝis kun la Palaco. Eĉ la maljunuloj komencas iom-post-iom forgesi, ke en ĉi tiu loko iam troviĝis ruinoj de domoj detruitaj dum la dua mondmilito, kaj kruĉiĝis stratoj, kiuj ne plu ekzistas.

La Palaco estas donaco de la nacioj de Sovetunio, ĝi estas alta 230 metrojn kaj, do, je 90 metroj pli alta ol la piramido de Ĥeopso. La Palacon oni konstruis dum tri jaroj. En ĝi troviĝas 3 300 ĉambroj, ĉambregoj kaj salonegoj. Se ekzemple en unu el ili naskiĝus infano kaj ĝi nur unu tagon restus en ĉiu ĉambro, je foriro el la lasta la infano estus jam naŭjara.

La Palacon tre ŝatas turistoj, interalie ĉar de sur la teraso, kiu troviĝas ĉe la 30a etaĝo, oni povas bone vidi la panoramon de Varsovio. Oni memoru pri tio okaze de la partopreno en la 72a UK kaj vizitante ĝin kunhavu fotilon. Ĉiutage la Palacon vizitas ĉ. 40 mil personoj — turistoj kaj homoj, kiuj tie laboras, ĉar en la Palaco havas sian sidejon 49 institutoj, inter ili kvar teatroj, Muzeo de Tekniko, Pola Unesko-Komitato, du fakultatoj de la Varsovia Universitato, kaj lastatempe Pola Esperanto-Asocio mem. Ankaŭ troviĝas tie Junulara Palaco kaj Kongresa Salonego kun loko por pli ol 3 200 personoj.

Dum pli ol 30 jaroj la diversajn kongresojn kaj konferencojn en ĉi tiu salonego partoprenis ĉ. 25 milionoj da personoj. Malnovaj legantoj de la revuo *Esperanto* certe memoras, ke en 1959 en la Palaco okazis la 44a Universala Kongreso de Esperanto. Ankaŭ la 72a UK havos sian kongresejon en kelkdeko da salonoj kaj salonegoj de la Palaco.

ap

Kun kaj por junularo en Bydgoszcz

"Se ni volas, ke Esperanto estu vivonta por la sekvontaj cent jaroj, ni devas labori kun junularo kaj por junularo." ***L.L. Zamenhof***

Lerneja halo, ne aparte granda; sur ĝiaj muroj, bunta amaso da afiŝoj; sur ĝiaj malkomfortaj seĝoj, same bunta homamaso, el ĉiuj aĝoj de sep ĝis sepdek, streĉe aŭskultanta la junulinan duopon kiu kantas ĉe mikrofono...

Cent jarojn ekzistas bela lingvo nia,
Cent jarojn jam sonas melodio ĝia.
Cent jarojn parolas Esperanton homoj de l' mondo,
De l' tuta tero, sub la sama ĉielo...

La Komerca Mezlernejo de Bydgoszcz jam la trian fojon gastigas la Tutpollandan Konkurson pri Esperanto-Poezio kaj Kanzono por Junularo. De la 13a ĝis la 15a de februaro ĉirkaŭ cent gejunuloj kantis kaj deklamis en Esperanto — ne nepre *pri* Esperanto, tamen! Apud kantoj kaj poemoj kiaj la ĉi-supra "pop-kanzono", vigle kaj harmonie prezentita de Katarzyna Kalamaja kaj Justyna Lis (kun la helpo de muzik-grupeto), aŭdiĝis pecoj kiaj la Invoko el *Sinjoro Tadeo*:

Sankta Virgin'! Vi gardas Ĉenstohovon helan,
En Ostra-Brama lumas! Vi, kiu kastelan
Nowogrodek defendas kaj pian urbanon!...

Plej frapa el ĉiuj temoj estis tiu de paco. Eble tio montras propran respondon de junuloj al la demando, "Kial lerni Esperanton?", ĉar oni sentis el la poemoj kaj kantoj, ke la partoprenantoj tute nature, senpripense uzas Esperanton por esprimi tiun sopiron. Inter la plej popularaj deklamaĵoj estis poemo de Jaroslaw Twaszkiewicz, tradukita de Leonia Freundlich...

Ĝi ne alflugos kiel kolombo,
Kiel sezon' de l' jar' ne venos,
Kaj ne eksplodos kiel la tondro,
Paco sur tero...
Sed ĝi naskiĝos el nia volo,
Kiel sang' ŝprucas el korinterno,
El penoj niaj ĝi kreskos sole,
Paco sur tero...

Krystyna Dyszkiewicz, kiu instruas en la Komerca Mezlernejo kaj estas ĉefa organizanto de la konkurso, esprimis optimismon pri ĝia estonteco. "Ĉiujare pli da homoj el pli da urboj partoprenas, kvankam plimulto ankoraŭ el nia lernejo kaj aliaj en Bydgoszcz, kaj oni rimarkas, ke la kvalito same kreskas. Venontjare la Ministerio pri Edukado kaj Instruado aŭspicios ĝin, dank' al la ĝisnuna valora subteno de la vojevodia [distrikta] inspektorato, kaj ni esperas allogi pli da eksterlandaj partoprenantoj. Ĉi-jare alvenis nur kvar hungarinoj, kvankam aliaj el Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio intencis veni."

Apogo de la Ministerio povus esti grava ankaŭ laŭ financa vidpunkto. La organizantoj de la konkurso elspezas sufiĉe grandajn sumojn por ebligi i.a. senpagan restadon de la konkursantoj en Bydgoszcz, kaj jam la subvenciado de la pola vojaĝagentejo Esperantotur montriĝis necesa por certigi la daŭron de tiu unika kaj altvalora aranĝo.

mf

Varsovio 1887

La proksimiĝanta 72a UK en Varsovio igis min pensi pri tio, kio alia interesa okazis en la urbo en la jaro kiam aperis la *Unua Libro*? Dezirante iom proksimigi al vi la forajn okazintaĵojn, mi trafoliumis la tiamajn jarkolektojn de malnovaj revuoj kaj kelkajn librojn, por ĉerpi el ili iujn bazajn informojn.

En la komenco de 1887 tri aferoj aparte interesis la varsovianojn. Jen oni informis, ke komenciĝis la preparoj por ŝanĝi la sufiĉe detruiĝintan pro la pluvoj kaj neĝoj kolonon de la reĝo Sigismundo la Tria por tute nova kolono. La konata Societo de la Belartoj komencis la konstruadon de sia propra sidejo "Zacheta", kaj fine oni anoncis konkurson pri la konstruado de Komerca Halego en la loko de la iama kazerno Mirowskie. Ĉi tiuj tri aferoj estis la ĉeftemo de interparoloj, samkiel cetere la malsukcesa karnavalo, en kiu fiaskis eĉ la, ĝis tiam, tradicie sukcesa Granda Maskobalo. La klare senteblan malvigliĝon de la societa vivo interrompis nur la koncertoj de la fama violonisto Pablo Sarasate, kies vizito en Varsovio fariĝis evento de la vintra sezono.

La printempo pasis sub la signo de la kreskanta interesiĝo de varsovianoj pri literaturo kaj literaturistoj. Post longtempa restado eksterlanda revenis al Varsovio la eminenta pola verkisto Henryk Sienkiewicz. Al literaturŝatantoj li deklaris, ke ankoraŭ en 1887 li komencos la laboron pri *Sinjoro Wolodyjowski,* la lasta el la romanoj konsistigantaj lian faman Trilogion. La 19an de marto la varsovianojn skuegis la sciigo, ke en Ĝenevo mortis la eminenta pola verkisto Józef Ignacy Kraszewski, la aŭtoro de pli ol 600 romanoj. Dume alia elstara pola verkisto, Boleslaw Prus (i.a. konata pro *La Faraono*) plenintense daŭrigis la verkadon de sia nova romano *La pupo,* kiun iom post iom komencis felietone aperigadi la ĵurnalo *Kurier Codzienny* (Ĉiutaga Kuriero). Estas interese, ke la fama verkisto verkis sian romanon de tago al tago, kaj la ĉefredaktoro de *Kurier* plendis al siaj amikoj, dirante, ke "kiam Prus vespere iras al teatro, tiam en lasekvataga numero de *Kurier* mankas daŭrigo de la romano."

Surkolone en Varsovio staras statuo de la nacia poeto de Pollando, Adam Mickiewicz (1798-1855). Liaj sonetoj, lirikoj kaj eposoj helpis inspiri la 19a-jarcentajn liberigajn movadojn.

La populara *Kurier Codzienny* kunlaborigis tiam aron da eminentaj verkistoj kaj ĵurnalistoj.En la redakcia kolektivo, apud la jam menciita B. Prus, troviĝis i.a. Wladyslaw Sabowski, kiu cetere la 7-an de aŭgusto 1887 publikigis en *Kurier* sian artikolon pri la lingvo de Doktoro Esperanto titolitan "Anti-Volapük", en kiu li elmontris la superecon de Esperanto kompare kun Volapuko. Cetere ĉi tion necesas substreki, ke lia artikolo estis lau nua en la historio pri la planlingvo de Zamenhof.

Se temas pri aliaj okazaĵoj de la 1887a jaro en Varsovio, ni menciu la kreskon de la kontraŭcarisma movado, precipe en la studentaj medioj de la Varsovia Universitato. Oni anoncis novajn decidojn pri limigo de la eniro de polaj infanoj en la lernejojn, per kio la caraj aŭtoritatoj, regantaj en la tiama Varsovio, deziras allasi al la lernejo nur la infanojn de gepatroj subtenantaj la carismon. La menciita vigliĝo de la kontraŭcarisma movado kredeble i.a. influis tion, ke Zamenhof devis sufiĉe longe atendi la permeson de la cenzuro por la aperigo de la *Unua Libro.*

La 29an de novembro varsoviaj studentoj decidis festi samtempe la datrevenon de la kontraŭcarisma Novembra Insurekcio de 1831 kaj la decembran mortodatrevenon de Adam Mickiewicz. Sed amasan mitingon omaĝe al la datreveno la caraj aŭtoritatoj certe ne permesus. Do en Varsovio okazis 24 solenaĵoj dissemitaj tra la tuta urbo kaj en ĉiu el ili partoprenis 15 studentoj. Farante paroladon en unu el la solenaĵoj Leon Wasilkowski emfazis, ke "politika revolucio celanta sendependigon de Pollando ne povas efektiviĝi sen socia revolucio". Li parolis pri eŭropaj socialistoj, pri Karl Marks. La diskuto estis vigla kaj daŭris ĝis malfrua nokto. Revenante hejmen la junuloj subite decidis iri al la monumento de reĝo Johano Sobieski, la fama venkinto kontraŭ turkoj apud Vieno en 1683. Ĉe la monumento oni solene ĵuris fidelecon al la patrujo.

Kaj do en la urbo iom post iom kreskis la socia streĉiteco. Kaj cetere ne senkaŭze. Franca konsulo Boyard en unu el siaj raportoj al la franca registaro en 1887 skribis: "La materiala situacio de la lando estas ĉiam pli malbona. Kreskas la nombro da almozpetantoj surstrate, la mizero pligrandiĝas, kaj kune kun ĝi la malkontento."

En tia streĉiteco reganta en Varsovio somere de 1887 aperis la *Unua libro* de Doktoro Esperanto; kaj povas esti, ke la sociaj problemoj, kiuj superregis, iom bremsis la interesiĝon pri la nova planlingvo, kvankam tuj samjare aperis la unuaj artikoloj pri ĝi, kune kun la unuaj adeptoj.

Andrzej Pettyn

INTERVJUO KUN ROMAN DOBRZYŃSKI

Fidi je la forto kaj saĝo de la Esperanta popolo

Estas ĝenerale sciate en la eŭropa Esperanto-movado, verŝajne iom malpli vaste aliloke, ke plurjara gvida problemaro en Pola Esperanto-Asocio kulminis, aŭtune de 1985, en eksigo de la elektita estraro de PEA fare de ŝtataj instancoj. Dum unu jaro gvidis PEAn samtempe nomumita provizora estraro. Tiu maltrankvila situacio finiĝis en novembro 1986, per eksterordinara kunveno de la (demokrate elektita) Ĉefa Konsilantaro de PEA, kiu siavice elektis novan estraron.

Cirkulis kaj cirkulas multaj asertoj rilate tiujn eventojn, precipe apoge al unu el du flankoj, reprezentitaj respektive de la eksigita estraro kaj de la plendintoj kontraŭ ĝi. Sendepende de la starpunkto, tamen, ĉiuj ĉefroluloj ŝajne konsentas, ke la problemoj de PEA fontis el interna batalo pri movada politiko kaj ne el iu ajn speco de ekstera politika premo.

Mi kaptis la okazon de vizito al Varsovio por paroli kun la nova prezidanto de PEA, Roman Dobrzyński, pri la eventoj en PEA kaj pri aliaj liaj taksoj kaj opinioj pri la Esperanto-movado. Dobrzyński, malalta, vigla homo kun milda, tamen memfide rekta parolmaniero, fariĝis vaste rekonata en Pollando pro siaj dokumentaj televidaj filmoj pri Latinameriko. Li ankaŭ aŭtoris plurajn librojn, precipe pri Hispanio kaj Portugalio, kaj lastatempe finverkis La venkoj de Guernica, *socio-historian studon pri la ĉefverko de Picasso. (Tiu libro estas la sola, kiun li ŝatus aperigi en Esperanto.) Antaŭ sia prezidantiĝo li plenumis neniun alian postenon en PEA.*

MF: Ĉu vi unue povus skizi la dimensiojn, laŭ vi, de la lastatempa krizo en Pola Esperanto-Asocio?

RD: Unue mi diru, ke en mia opinio estas troigo paroli pri "krizo" kvazaŭ ĝi enplektus la tutan polan Esperanto-movadon. PEA fakte restas tre forta ĉe la baza nivelo de la membraro. Spite la konfliktojn en la gvidantaro, niaj dek mil membroj, nia loka strukturo, nia trideko da pagataj oficistoj en diver-



saj partoj de la lando — ĉio tio daŭras, en iuj lokoj eĉ mirinde progresas. Mi povus citi la ekzemplon de Bydgoszcz, kie sendube estas la plej forta loka movado en la mondo — inter du mil kaj tri mil membroj en sufiĉe malgranda regiono. Aŭ la kazon de Plock, kie okazis vera eksplodo dum la lasta jaro. Kiel mi konstatis dum prilaboro de mia aperonta filmo pri la tutmonda Esperanto-movado, la daŭra, amasa kultura agado en Pollando estas simple fenomena. Do ankaŭ la potencialo kiun ĝi montras por la estonto de Esperanto restas sendependa de la problemoj en PEA.

MF: Kun tiel forta bazo, kiamaniere estiĝis tiel profunda krizo inter la gvidantoj de la pola movado?

RD: Miaopinie, oni ankaŭ povas troigi en la impreso, ke temis pri batalo en PEA de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. La tiel-nomata "krizo" ekestis el miskomprenoj inter personoj, individuoj, en PEA, kaj la motivoj por la sekvaj bataloj estis pli personaj ol politikaj. Tamen, kion vi eventuale aŭdis estas vera, ke en la dis-

puton interne de PEA oni enplektis esence politikajn argumentojn. Pri tio kulpas ambaŭ flankoj, cetere, ĉar ambaŭ atakis kaj defendis sin reciproke per politikaj argumentoj. Mi volas substreki, ke tiaj kontraŭstaroj kaj disputoj ene de la movado povas esti fakte ege valoraj. Neniel devas ekzisti unueca opinio pri ĉio. La grava manko en la antaŭaj estraroj de PEA estas tio, ke ili ne sukcesis utiligi tiujn kontraŭstarojn por konstrua evoluigo de la movado.

MF: Ĉu, laŭ vi, tiu konstrua evoluigo nun eblas, fare de la nova estraro de PEA?

RD: Por certi pri tio ni devos atendi kelkajn monatojn, ĝis post la Universala Kongreso. Sed ĉar temas pri la nuna estraro, mi povas diri, ke la eksterordinara kunveno de la Konsilantaro, pasintan novembron, estis brila sukceso laŭ du kriterioj. Unue, ĝi igis tute klaraj la motivojn kaj argumentojn de la diversaj flankoj en la disputo. Kvankam temis pri kunveno de la elektitaj reprezentantoj de la lokaj filioj, povis paroli tie iu ajn; do klarigis siajn starpunktojn membroj de la eksigita estraro, la provizora estraro kaj aliaj ĉefroluloj, senpere al ĉiuj ĉeestantoj. Oni povis aŭdi la argumentojn de la diversaj homoj kaj juĝi mem.

Sekve, la kunveno sukcesis en tiu senco, ke oni per voĉdonado lasis ekster la organoj de PEA reprezentantojn de la ekstremoj. Tio laŭ mi montras la forton kaj saĝon de la Esperanta popolo. Mi devas substreki la absolutan demokratecon de ĉi tiu proceduro, kiu rezultigis estraron en kiun iris tute novaj, dinamikaj kaj senprecedence junaj homoj. Mi estas efektiva veterano en la nuna teamo!

De tutsama graveco por PEA estis la akcepto, fare de la kunveno, de nova statuto. En mia opinio, ĉi tiu estas nun preskaŭ perfekte demokrata. Ĉiu loka filio ricevas po unu delegito por cent membroj — do entute ĉirkaŭ cent por la tuta lando — kaj tiuj delegitoj elektas el inter si 40-personan Ĉefan Konsilantaron, kiu kunvenas dufoje jare. Male kiel la antaŭa situacio, tiu Konsilantaro povas kontroli kaj se necese ŝanĝi la aktualan estraron, inkluzive de la prezidanto — do, se mi malbone plenumos mian rolon, eblos tutsimple eksigi min! Antaŭe tia demokrata kontrolado ne estis ebla, ĉar la prezidanton elektis la tuta delegitaro kaj li fariĝis pli-malpli propravola agento ĝis la posta laŭstatuta voĉdonado.

MF: Ĉu vi antaŭvidis, antaŭ la novembra kunveno, ke vi nun plemumos ĝuste tiun prezidantan rolon?

RD: Tute ne — mi efektive fariĝis prezidanto tute hazarde! Lastatempe mi ofte vojaĝis ekster Pollando, kaj fakte la tagon post la kunveno mi forflugis al Brazilo por tri monatoj. Sed mi tamen konsentis akcepti la postenon, ĉar evidentiĝis, ke oni volas havi tute novan estraron de homoj, kiuj restis ekster la antaŭaj bataloj. Ankaŭ pro mia antaŭvido, ke la centjariĝo de Esperanto kreos tute novan etapon en ĝia disvastiĝo. Kaj super ĉio, pro la Universala Kongreso en Varsovio. Mi mem ne sentas bezonon de ĉi tiu posteno por persona satisfakcio, aŭ por antaŭenigi mian karieron. Tio tamen povas esti avantaĝo. Ĝuste tiaj, laŭ mi, devas esti gvidantoj de la Esperanto-movado — ne nepre la prezidanto mem, sed homoj en sufiĉe altaj pozicioj. Oni povus diri, ke unu el la kaŭzoj de la krizo en PEA estis la traktado de Esperanto kiel ŝtupo en persona kariero, kiel sola instrumento de persona pligravigo. Tiaj homoj, kiel ajn utilaj ili estas, prefere ne okupu gvidajn poziciojn en la movado. Ĉiu homo havas iun rolon aŭ taskon por plenumi, do tre gravas, kiam lia utileco forpasis, ke li sciu retiriĝi — ke li finfine havu kien iri.

MF: Ĉu el la gvidaj problemoj de PEA vi eltiris pliajn konkludojn, kiuj povus validi por la movado ĝenerale?

RD: Plia motivo de mia akcepto estis mia konvinko, ke movada gvidanto — precipe estrarano — devas akcepti esperantistojn tiaj, kiaj ili estas, kaj senti sin unu el inter ili. Plue, la prezidanto aparte devas strebi por tio, ke la membroj fieru pri li. Tiurilate mi malkaŝos, ke influis mian decidon ankaŭ la scio, ke Humphrey Tonkin — kolego mia el la sesdekaj jaroj, kiam ni samtempe laboris en la estraro de TEJO — denove estas prezidanto de UEA.

JUBILEU KUN NI !

UEA havas la belan kutimon plusendi sian revuon, dum la unuaj tri monatoj de la jaro, al tiuj, kiuj ankoraŭ ne reabonis. Se vi estas unu el ili, estas tempo fari ion! Pripensu, kion nereabonante vi maltrafus:

- **venontajn numerojn pri instruado kaj informado, Esperanto en scienco kaj tekniko, la Esperanta gazetaro kaj aliaj kernaj temoj**
- **buntan, dikan, jubilean numeron antaŭ la Universala Kongreso**
- **ampleksajn raportojn pri la jubileaj aranĝoj, super ĉio pri la UK en Varsovio.**

Ne maltrafu la centran organon de la Movado.

Jubileu kun **esperanto**



Dobrzyński je laboro: en Kostariko, 1979, ĉe la vulkano Jrazú.

Rilate Pollandon mi havas la avantaĝon, ke pro la apartaj trajtoj de la televido mia vizaĝo estas ĝenerale konata. Do kiel prezidanto, mi ne estos simpla nomo aŭ cifero por la membroj, sed espereble ili sentos, ke ili konas min, ke ili salutus min en la strato kiel amikon.

MF: Ĉu vi trovas, ke tiu via profesia laboro ofte interplektiĝas kun via rolo kiel esperantisto?

RD: Nur lastatempe mi komencis elserĉi esperantistojn en la landoj, kiujn mi vizitas profesie. Sed mi intervjuis prezidentojn kaj altrangajn homojn en preskaŭ ĉiuj latinamerikaj ŝtatoj, kaj tio ĉiam lasas eblecon informi pri Esperanto. Ekzemple vi scias, ke kiam oni faras intervjuon, oni ne tuj komencas per la unua demando, nek finas per la lasta. Ĉiam estas iom da simpla babilado, konversacio. Tiam la temo de Esperanto ofte leviĝas tute nature, sentrude. Se oni demandas min pri tio, kiel kaj kial mi lernis la hispanan, mi rakontas pri mia unua Esperanta korespondamiko en Hispanio, kiu instigis tion. Ankaŭ okazas tute hazardaj renkontiĝoj, kiel tiu en Machu Picchu, kie nia televida teamo koincidis kun vizito de la reĝa paro de Hispanio. Sen iu ajn antaŭplanado mi havis okazon sufiĉe longe paroli kun la reĝino.

MF: Kaj kio pri esperantistoj en Latina Ameriko? Vi lastatempe faris iujn kontaktojn pro via filmo pri Esperanto, ĉu ne?

RD: Efektive. Tiu filmo eble konsistigas mian plej gravan laboron por Esperanto ĝis nun. Ĝi estas komuna bulgara-pola entrepreno, ĉar iniciatis ĝin Donĉo Ĥitrov kaj oni nur poste proponis min kiel la reĝisoron. Ĝi estos farita en dek kvar landoj, kun emfazo pri la aktuala stato kaj funkciado de la tutmonda Esperanto-movado. Tiel mi supozas, ke ĝi estos unika kiel profesia pritrakto de tiu temo, ĉar oni planis ĝin sur tute komerca bazo. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu ĝi vere estos interesa! Mi baldaŭ filmos la lastajn erojn kaj komencos kunmeti ĝin, tiel ke ĝi espereble pretos ĝis la kongreso. Ĝi estos facile tradukabla en aliajn lingvojn el la pola, ĉar plimulto de ĝi montras homojn parolantajn Esperanton, kaj mi provas teni la komentarion ĝis la minimumo.

Kiel vi diris, estas ĝuste la filmo kiu instigis min fari miajn unuajn kontaktojn kun latinamerikaj esperantistoj. Dum mia lasta vizito mi filmis homojn en Uragvajo, Argentino kaj Brazilo, kaj mi reportis el tio tre profundajn impresojn. Aparte la brazila movado frapis min — per sia juneco, per ĝia relative alta lingva nivelo, kaj per ĝia sukceso enradikiĝi en la ĝenerala socio. Ankaŭ la obstineco de tieaj homoj paroli en Esperanto estas rimarkinda. Mi renkontis du fratojn, ekzemple, kiuj de kelkaj jaroj uzas Esperanton kiel ĉiutagan lingvon inter si. Tiuj kvalitoj povas esti ege gravaj por la movado ĝenerale — ne nepre en la sama formo, ĉar ĉiu socio prezentas siajn proprajn difinojn kaj kondiĉojn, sed kiel rimedoj por trovi la vojon al plena akcepto de Esperanto en tiu socia medio.

Stabo de la C.O., de maldekstre: Simo Milojević, Francisko Ksavero Moleono, Osmo Buller, Rob Moerbeek, Pasquale Zapelli, Marvin Stanley, Jan Dukel, Lindy Faaij, Roger Blaine, Mark Fettes, Karl Trimborn, Jan Exmann. Ne ĉeestas: Ina van der Krans, Ina Merceij.

La Centra Oficejo jubileas, per juna vervo kaj veterana lerto

Unu jubileon ĉi-jare oni festos en ŝvito kaj laboro. Tio estas la 25-jariĝo de Nieuwe Binnenweg 176 kiel adreso, kiun parkere konas miloj da esperantistoj tra la mondo. La 12an de aprilo 1962 la Centra Oficejo de UEA inaŭguriĝis en la nuna domo. Jen do kial nia stabo, laboranta en tiu kerno de la Movado, kolektiĝis por kune fotiĝi sur la tegmento de la nova alo de la domo, pasintjare finkonstruita. Kiel vi vidas, kelkaj el ni eĉ ne naskiĝis, kiam la oficejo instaliĝis ĉi tie.

La sorto volis, ke 25 jarojn poste mi laŭvorte citu, kion meze de translokiĝo kaj konstrulaboroj skribis en nia revuo f-ino Marianne Vermaas, mia meritplena antaŭulo kiel direktoro de la CO: "Pro la nuna eksterordinara situacio en la Centra Oficejo neevitable estiĝis prokrasto en la plenumado de pluraj taskoj kaj precipe en la korespondado. Ni petas indulgon kaj paciencon de tiuj, kiuj atendas respondon. Ni esperas baldaŭ ĝisdatigi la aferojn." Nu, dank' al mia diligenta kolegaro tiu citaĵo ne plu tiom aktualas kiom antaŭ kelkaj monatoj, kiam — denove post konstrulaboroj — necesis lukti por rekapti la ritmon sur preskaŭ ĉiu kampo de nia laboro.

Efektive, lastjare la Centra Oficejo kolapsis. Ene de kelkaj monatoj ni perdis duonon de la oficistaro, spertajn, valorajn homojn, kaj ni ne sufiĉe frue ekserĉis posteulojn por ili. Pli-malpli unu tutan jaron restis breĉo en la laborforto. Tio kaŭzis fuŝojn kaj prokrastojn, por ne paroli pri koleraj leteroj. Tamen nun la aferoj ekaspektas alie. Ke la membroj ne nur indulgis kaj paciencis, sed ofte ankaŭ ŝovis kuraĝigan vorton en siajn leterojn, tre instigis nin. Dankon! Malfeliĉo montras amikon.

La novdungojn parte bremsis la emo — troigita ja! — ŝpari por eviti, ke ripetiĝu la timigaj deficitoj de la lastaj jaroj. Provizoraj ciferoj de nia nova financulo Marvin Stanley efektive montras, ke kvankam likvido de pli fruaj financaj mispaŝoj igos la finrezulton minusa, en 1986 UEA tamen elspezis malpli ol ĝi enspezis. Sed ja validas la demando, ĉu tian gajnon ni ne prefere atingu per enspezigaj laboroj de plena stabo, kaj je ĉiu kosto evitu malboniĝon de la servoj al la membraro.

Tiu ĉi revuo bone reprezentas la estintajn problemojn same kiel la vervon kaj neantaŭjuĝon, kiujn en nian laboron enblovas la juniĝinta trupo. La granda malfruo jam estas venkita, sed kredu, ke tio postulis de Mark Fettes, la nova redaktoro, septagajn semajnojn. En la lasta nokto antaŭ la enpresejigo de la jarfinaj numeroj, li kune kun Jan Dukel,

nia kompostisto, staĥanovis ĝis post la dua matene. Tiaj heroaĵoj ne plu necesas. Tamen, la duopo firmas pri sia celo iom-post-iom pli fruigi la aperadon, por ke fine ĉiu numero venu al la leganto frue en la monato, kies nomo staras sur ĝi.

Ankaŭ ĵurnalisme la revuo renoviĝas. Eble vi jam rimarkis en la redakta politiko de Mark signojn pri ŝanĝoj taŭgaj por tiu ĉi periodaĵo — la plej influhava en la Movado, kaj tial aparte respondeca pri ties evoluo. Tiel do ĉi-numere vi povas legi pri "la polaj eventoj" en intervjuo kun la nova PEA-prezidanto, same tiel amiko de rekta parolo. Estis eraro, ne kuraĝe alfronti jam dekomence tiujn kaj aliajn tiklajn, foje eĉ tabuajn problemojn. Malfermiteco estas forto, dum ĝia manko nutras putrajn evoluojn.

Francisko Ksavero Moleono — pri esperantigo de sia nomo li ŝulce insistas — sidas fokuse de la atento de ĉiu membro. Li redaktas la Jarlibron. Cetere, li *ne* redaktis tiun de la pasinta jaro! Pri sia debutaĵo Ksaĉjo tiel progresis, ke en kiu ajn momento li povos anonci, ke ĝi jam iris al presejo. Do, dece frue vi ricevos ĉi-jare tiun legendan libron, sen strangaĵoj, kiuj garnis la antaŭan. Sed ne sendu proteston, se viaj stratnomo kaj -numero aperas malsamlinie aŭ via telefonnumero same dividiĝis... Venas ja plendoj pri tiuspecaj eroj, neeviteblaj en similcelaj adresaroj. Tamen ne timu, ke iu ajn tial perdus la vojon al vi!

Post la Jarlibro atendas Ksaĉjon la laboroj pri alia samformata baza verko: nova katalogo de la Libroservo de UEA. Ĝia apero certe akcelos la libroservajn vendojn, kiujn jam de tri jaroj prizorgas Karl Trimborn. Ke Karlo fariĝis proksima al nia leganta popolo, tion ofte pruvas dankaj poŝtkartoj pri ricevitaj libroj kaj varmvortaj aldonoj ĉe novaj mendoj. Vere, eĉ kiaj ajn la problemoj, kiujn ni havis sur iuj kampoj, la Libroservo glate funkciis. Tamen, la vendoj grave malkreskis pasintjare, i.a. ĉar aperis nur unu granda propra eldonaĵo de UEA, *Amo kaj morto en Balio*. En decembro aliĝis al ni Jan Exmann, kiu prespretigas manuskriptojn. Lia unua produkto, *Vetero kaj klimato de la mondo,* jam aperis. Pliaj sekvos: *La fenomeno esperanto* (W. Auld), *Esperanto: lingvo—literaturo—movado* (P. Janton), giganta antologio de originala prozo, kaj aliaj. Iujn el la libroj kompostas ni mem, aliajn nia Grafika Centro en Antverpeno. Ĉiujn presas Tuijtel, fidinda firmao en Roterdamo, kiun de jaroj UEA uzas ankaŭ por la revuo kaj aliaj eldonaĵoj.

Librojn, kiujn vi mendas de Karlo, ekspedas Rob Moerbeek, multtalentulo, lingva instanco, kiun okaze de gramatika dubo ni helpokrias. Rob estas veterano ĉe ni, same kiel Ina Merceij, purigistino, kiu lerte inspiras nin teni ian ordon sur niaj tabloj. Jam en la tempo de Vermaas eklaboris Ina van der Krans, kiu prizorgas la amasan librotenadon. Al ŝi vi dankas ankaŭ la ricevon de tiu ĉi revunumero, ĉar plej verŝajne estas ŝi, kiu registris vian kotizon. Sed... ĉu vi kotizis jam por tiu ĉi Jubilea 1987? Se ne, tiu ĉi numero estas via lasta! Nu, plejparto jam certigis ricevadon de la postaj numeroj, inter kiuj, cetere, elstaros la jubilea — dika kaj plurkolora.

La kulmino de la Jubilea Jaro, la varsovia UK, jam de monatoj estas ĉiutaga vivo por Pasquale Zapelli, kiu administras tiun enorman kunkolektiĝon, pli grandan ol iu ajn el la antaŭaj 71. Kaj eĉ tio ne sufiĉas: ankaŭ la pekina UK laborigas lin. UEA rezignis, favore al la kongresanoj kiuj mendis siajn servojn pere de ni, pri granda parto de la surpriza gajno, kiun alportis la drasta kurzfalo de juano. Tiuj repagoj estas ege temporabaj kaj ĝenas ceteran laboron. Kiom da tempo estus ŝparita, se UEA ne estus pensinta pri la kongresanoj, sed senhonte sekvinta simplan kapitalismon kaj enpoŝiginta la tutan profiton... Tamen, vidu la imponan Oficialan Informilon ĉi-numeran: multaj el ties donacintoj estas pekinaj kongresanoj. Ilia solidareco pruvas, kian fortan fidon havas la membroj en nia Asocio!

Pri tiaj aferoj ni ĉi tie okupiĝas. Se iun laborkampon vi ne trovis menciita ĉi-supre, supozu, ke pri ĝi devus respondeci aŭ mi aŭ Simo Milojević, la ĝenerala direktoro, centraoficisto jam de 13 jaroj. Ĉiukaze, kiam vi havas peton por ni aŭ eble eĉ plendon, ne zorgu, se vi ne scias, al kiu oficisto vi skribu. Lindy Faaij estas tiu, kiu la unua legos vian leteron, kaj ŝi majstras la tutan labirinton kaj scias ĝuste pludoni vian mesaĝon. Ne forgesu noti vian UEA-kodon! (Vi trovas ĝin sur la adresetikedo de la koverto, en kiu venis tiu ĉi numero.) Tiel vi simpligas la traktadon de via afero, kia ajn ĝi estas.

Se vi ĝuste nombris, nun laboras en la Centra Oficejo 13 oficistoj, kelkaj tamen nur partatempe. Niaj rimedoj ne permesas havi tiun nombron konstante, sed por inde servi la membraron en tiu ĉi grava jaro, ĉiuj estas bezonataj. Krome, helpas nin volontuloj. Dum pluraj lastaj monatoj volontulis Giti Ahmad-Nia; aliaj malpli longatempaj helpantoj laste estis Anita Lindblom kaj Georgo Kamaĉo. Daŭre helpas Jurek Jurczynski pri financa administrado. Plej laste aperis Roger Blaine por labori en Biblioteko Hodler — tiel laste, ke eniri la ĉi-kunan foton estis lia unua tasko. Kaj kiel ni fartus kun la ĉefa komputilo de la Movado, se ne ekzistus Fred de Geus kaj Hardo Bourguignon, kiuj komprenas ĝiajn kapricojn!

Jes, sennacia estas tiu ĉi nia rondo. Tial mi ne pensis listigi supre, kiu el kiu lando venas. Neniu pensas pri tio. Nu, mi foje laŭdas Finnlandon, sed tio estas alia afero.

Kato gapas min balkone.

Osmo Buller

Elstaraj eventoj de la Jubilea Jaro

Ĉar la informoj en la kalendaro estas iom magraj, kaj multaj homoj verŝajne ne orientiĝas en tiu amaso da aranĝoj, ni decidis elstarigi kelkajn el la plej interesaj el internacia vidpunkto: precipe esperantologiaj, kulturaj, junularaj. Tio ne signifas, ke ni nepre rigardas tiujn aranĝojn pli gravaj ol aliaj! Detala pritraktado de la tuta kalendaro jam plenigus ĉi tiun numeron, do evidente necesis elekti; kaj laŭ ni, la jenaj aranĝoj kune donas viglan kaj interesan bildon de la eŭropa movado en la Jubilea Jaro. Pri la neĉeesto de la ekstereŭropa movado, vidu "Vi trovos"...

Kulturaj festivaloj

En verŝajne ĉiuj landoj de la Esperanto-komunumo oni planas grandajn aŭ malgrandajn kulturajn festojn honore al la Jubileo. El la naciaj kongresoj ni povus aparte mencii la hispanan (04.16-20), kies kultura programo ŝajnas aparte bone prizorgata. Ankaŭ imponas la skizita programo de la **5a Dekado de Esperanto** (08.15-23) en Sverdlovsk, Sovetunio — urbo, kiu fariĝis centro de kvazaŭa kultura renesanco en la urala Esperanto-komunumo (pri kio ni baldaŭ raportos en la revuo). Aliloke menciindas la **Jubilea Kultura Festo** en Londono komence de julio, kaj la **5a Pariza Festivalo** de teatro kaj kanzono en oktobro. Ni ne povas ne mencii ankaŭ la **60an SAT-Kongreson** (08.22-29) en Bulonjo-sur-Maro, la loko de la unua Universala Kongreso; SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) mem estas unika kultura fenomeno, kaj ĝia kongreso endas aparte por tiuj, kiuj ne timas disputadon kaj politikajn debatojn. Sed la jaro sendube fokusiĝas ĉirkaŭ la du semajnoj fine de julio kaj komence de aŭgusto, kiam la Universala Kongreso en Varsovio kaj la Kultura Festivalo en Zagrebo kune konsistigos la plej amasan kaj altnivelan prezenton de Esperanta kulturo (lige kun tiu de la gastiganta lando) iam ajn realigita.

Chopin, en la parko Łazienkowski

Kion oni spertos tie? En Varsovio, temas pri jubilea kongreso kun la temo "Cent jaroj de internacia kulturo", kaj la programo intence havas aparte festan karakteron. Laŭ prezidanto de LKK Stanislaw Świstak, posttagmeze de la 26a — la tago de la Unua Libro — oni planas grandegan eksteran feston sur la placo ĉirkaŭ la kongresejo. Oni cetere projektas escepte buntan muzikan programon — Chopin-koncertojn tra la tuta semajno en la parko Łazienkowski, kant-kaj-danc-ensemblojn el Varsovio, Plock kaj aliloke, infanajn koncertojn, kaj super ĉio prezentojn de esperantistaj kantistoj kaj muzikistoj (Barbuloj el Ĉeĥoslovakio, Joëlle Rabu el Kanado, Ĵak Le Puil al Francio, por nomi nur tri). Aldoniĝos ampleksa teatra programo realigita de profesiaj kaj amatoraj trupoj, inter aliaj la solulino Jadwiga Gibczynska en "Zamenhof", lodza trupo en "Feliĉa Okazintaĵo" de Sławomir Mrożek, kaj aliaj el ekster Pollando. Ankaŭ la fama pola pupteatro "Rabcio" prezentos sian arton. La premiceremonio de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj cetere okazos kadre de la kongreso.

En Zagrebo, la semajnon tuj post la UK, temas pri la jam tradicia Pupteatra Internacia Festivalo kaj pri granda aro da aliaj aranĝoj organizitaj ĉirkaŭ ĝi. PIF mem festos sian dudekan jaron, kaj honore al tio oni invitis ok el la plej famaj mondaj pupteatroj partopreni. Apud tio estas ampleksa "homteatra" programo, inkluzive de kaj profesiaj kaj amatoraj trupoj. Meze de la semajno okazos koncerto de Esperanto-kantoj, realigita fare de profesiaj muzikistoj kaj kantistoj el diversaj landoj. Aliaj programeroj dediĉiĝas al literaturo kaj al radio-filmo-televido, kaj dum la tuta semajno eblas rigardi grandan ekspozicion kiu celas prilumi la

vastan amplekson de la Esperanto-movado. Ankaŭ oni mem povas partopreni la diversajn kulturajn agadojn. Kiel finalo okazos Esperanto-foiro en vilaĝo ekster Zagrebo, samtempe kun nacia folklora festo kaj prezento de kulturverkoj elfaritaj dum la semajno mem.

Aparte menciinda sur kultura kampo estas la kreskanta aktiveco de Kultura Centro Esperantista en la Chaux-de-Fonds, Svislando. Ĝiaj ĉi-jaraj kursoj kaj seminarioj gamas de "La Dia Komedio: Fundamento de la literaturaj lingvoj itala kaj Esperanta" ĝis "La Go-ludo", kaj krome ĝi okazigas plurajn piedmigradojn, botanikajn ekskursojn kaj simile. Nur lastatempe ĉesis la konstruado ĉe KCE, kaj ĝia potencialo kiel movada centro en mezokcidenta Eŭropo ankoraŭ disvolviĝas.

Esperantologio kaj interlingvistiko

La **15a Scienca Interlingvistika Simpozio** (04.29-05.03), organizita de Akademia Centro Interlingvistika en Varsovio, havas kiel ĉeftemojn "Etnolingvaj influoj al Esperanto" kaj "Kulturaj kaj socipolitikaj influoj al la Esperanto-movado". Ĝi do celas difini, kiugrade la zamenhofaj konceptoj pri la lingvo kaj movado montriĝis influeblaj de individuoj, grupoj aŭ apartaj cirkonstancoj, kaj kio el ili restas ekster ĉiu influo kaj kreas la esencan kernon de Esperanto.

Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj (Kastelo Grésillon) organizas **Jubilean Esperantologian Semajnon** meze de julio (07.16-22), kie prelegos eminentaj instruistoj kaj aliaj kiel prologo al la UK en Varsovio.

La **Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz** (07.18-25) havas esence esperantologian karakteron, kun dekduo da lekcioj pri "Cent jaroj de" diversaj aspektoj de la lingvo kaj movado. La aro da lekcistoj kaj membroj de la Internacia Patrona Komitato, inkluzive de vaste konataj movadaj figuroj (Albault, Régulo, Boulton, Ragnarsson, Neergaard k.a.) kaj de altrangaj sciencistoj el dekkvino da landoj, formas imponan omaĝon al la iniciatinto de la Konferenco, prof. d-ro Ivo Lapenna. La intelekta nivelo do plene indos je tiu korifeo de la movado. Estas nur bedaŭrinde, ke kvankam la Konferenco "ne estas aranĝo de ICNEM [Internacia Centro de Neŭtrala Esperanto-Movado, de kiu prof. Lapenna estas prezidanto], nek de UEA, nek de SAT, nek de kiu ajn alia Esperanto-organizaĵo", aliflanke el la maniero de ĝia traktado en *Horizonto* kaj *La Gazeto* facile eblas supozi — kaj multaj certe supozos — ke ĝi tamen ligiĝas kun la en- kaj ekstermovada politiko de tiuj periodaĵoj. Pri la demando, ĉu tiu linio devus influi la decidon iri aŭ ne, same kiel pri ĝiaj propraj meritoj aŭ malmeritoj, ĉiu unuopa esperantisto kompreneble juĝos mem. (Ĉiukaze, pretendoj, ke "oni morale ne rajtas apogi jubilean kongreson en Varsovio" kaj simile, ŝajne ne trovas vastan akcepton en la movado.)



La bela skulptaĵo "La espero", dediĉita al Esperanto fare de dana skulptisto Jesper Neergaard, inaŭguriĝos sur placo en Graz, Aŭstrio, dum la Jubilea Konferenco tie.

Kadre de la Universala Kongreso, la dekan fojon okazos **Esperantologia Konferenco** kiel unu aspekto de la ĝenerala temo "Cent jaroj de internacia kulturo". En du matenoj la respektivaj fakuloj I. Szerdahelyi, N.T.R. Salvesen, U. Lins kaj D. Blanke donos superrigardon pri la lingva, kultura, historia kaj socipolitika flankoj de la Esperanto-movado. En ĉiu sesio la prelegon sekvos ĉepodia diskuto inter aliaj sciuloj pri tiu esplorkampo, kun partopreno de la aŭskultantaro.

Ankaŭ la kultura festivalo en Zagreb kiu sekvas la UKon entenas **Internacian Sciencan Simpozion** (08.02-05) kun la temo "Problemoj de komunikado en internaciaj organizaĵoj". Partoprenos kelkdeko da fakuloj kaj aparte reprezentantoj de UN kaj Unesko. Kunorganizas la simpozion Kroatia Esperanto-Ligo kaj la Instituto por Evolulandoj en Zagrebo.

La longa interlingvistika tradicio de la aŭstriaj universitatoj rezultigis, ke en tiu malgranda lando fine de oktobro okazos tre impona **Internacia Scienca Simpozio "Esperanto 100-jara"**. La simpozio, ĉefa evento de Aŭstria Laborkomitato Esperanto Centjara, rikoltas gravan enlandan subtenon — du ministrojn, urbestron de Vieno, direktoron de la nacia biblioteko, rektoron de Universitato de Vieno (kadre de kiu la Simpozio okazos) — precipe per lerta utiligo de Unesko-rezolucio 23/11.11. Plej laste Unesko mem donis sian apogon al la konferenco. La prelegoj, fare de konataj esperantologoj kaj universitataj profesoroj (Back de Vieno, Brozović de Zadar, Companys de Parizo kaj multaj aliaj) pritraktos temojn kaj specifajn (ekz. la lingvistika programo de la Unua Libro, la poezia verkaro de Waringhien) kaj ĝeneralajn (Esperanto kaj la kritikebleco de lingvoj, politik-ideologia kontraŭstaro al Esperanto ktp). La germana estos dua laborlingvo de la Simpozio, tiel malfermante ĝin al ne-

esperantistaj fakuloj kaj al vasta informbezona publiko.

En Bulgario, komence de oktobro, okazos **Simpozio Internacia Interlingvistika "Cent jarojn esperantologio"**, komuna aranĝo de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj kaj Bulgara Esperanto-Asocio. Prelegos eminentaj esperantologoj kaj interlingvistoj el pluraj landoj.

Meze de novembro la Pola Instituto de Internaciaj Aferoj patronos la **9an Konferencon pri Internacia Lingva Komunikado,** organizitan de Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj. Lingvistoj, filozofoj, sciencistoj, studentoj kaj similaj "aktivaj" partoprenantoj diskutos en la pola kaj Esperanto pri la malnovaj lingvoj, planlingvoj kaj modernaj lingvoj en internacia kadro.

Kelkaj per-Esperantaj fakaj aranĝoj

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) okazigos sian kvinan **Sanmarinan Universitatan Semajnon** en San Marino komence de septembro. En SUS4, okazinta komence de aprilo, oni koncentriĝis pri urĝaj juraj kaj administraj aferoj cele la plievoluigon de AIS. Tiel SUS5 fariĝos la centra per-Esperanta scienca aranĝo de la Jubilea Jaro, kun kursoj de i.a. profesoroj Alsleben, Pancer, Pennachietti, Kawamura, Frank, Lapenna kaj Neergaard, debutprelegoj kaj ekzamenoj. Cetere, la trian de septembro okazos la jara datrevena festo de la fondo de la Sanmarina Respubliko.

Meze de septembro okazos en Tarragona, Hispanio, la dua mondkongreso de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko), **Interkibernetik'87.** Laŭ la statuto de TAKIS, laborlingvoj de la konferenco estos Esperanto (aŭ Internacia Lingvo, laŭ la oficiala ĵargono de la organizaĵo), la angla, la franca kaj la lokaj lingvoj — la kataluna kaj la hispana. Ĉu post kelkaj jaroj la sperto de tia lingva Babelo igos la partoprenantojn uzi pli kaj pli vaste Esperanton? Tion verŝajne esperas la meritulo sur tiu kampo, prof. Helmar Frank, kiu pasigos ŝtopitan septembron kiel sekretario de AIS kaj komitatano de Interkibernetik.

Aparte rimarkinda estas la **23a Kolokvo de AIMAV** (Internacia Asocio por Evoluigo de Interkultura Komunikado), unu el la neregistaraj organizaĵoj de Unesko, kiu okazos en la Universitato de Gento, Belgio, fine de septembro. La temo de la ĉijara kolokvo estas "La intereso kaj utilo de komuna interlingvo"; ĉar la aranĝo uzos ne malpli ol kvar laborlingvojn (la nederlandan, francan, anglan kaj Esperanton), oni povas antaŭvidi profundan konsciiĝon pri la signifo de tiuj vortoj! Ĉu la takso de la kolokvo pri Esperanto spegulos tion?

KIEL SENBARILIGI ESPERANTO-KONGRESOJN

Ĉu ni handikapitoj vere estas bonvenaj en Esperanto-kongresoj? La kutimaj kongresoj kaj konferencoj ankoraŭ ne permesas la partoprenon de handikapitoj. Organizantoj senpense elektas kongresejojn kiuj baras la vojon al uzantoj de radseĝoj.

En 1981, rezolucio de UEA montris la intencon senbariligi estontajn kongresojn. Nun ne estas tro frue efektivigi tiujn belajn vortojn per taŭga prizorgo. Jen kelkaj ĝeneralaj bezonoj de radseĝuloj:

- La trotuaroj inter la kongresejo, restoracio kaj hotelo estu glataj kaj nivelaj. Malkruta ramplo (klino malpli ol 50 mm vertikale por ĉiu 1000 mm horizontale) ekzistu kie la trotuaroj renkontas la stratojn. Se ŝtupoj ekzistas ĉe iu enirejo, provizu ramplon tie. (Provizora ramplo povas esti ligna.)
- La pordoj al la necesejoj en la kongreseo kaj hotelo estu minimume 800 mm larĝaj. Estu senobstakla spaco 1500 oble 1500 mm por manovrado en la klozeta fako por radseĝulo. La klozeto estu en angulo de la fako, kaj la sidilo estu 430 mm alta por faciligi la glitadon flanken de la radseĝo. Fortikaj horizontalaj manreloj (40 mm diametre) estu 915 mm super la planko flanke kaj malantaŭ la klozeto. La neceseja papero estu sub la flanka manrelo.
- En la hotelo, estus bone se la radseĝulo havus la elekton inter ĉambroj kun banujo aŭ duŝejo. Ambaŭ bezonas manrelojn. Sub la lavbaseno estu spaco (ĉirkaŭ 700 mm alta) por la kruroj de la radseĝulo. La supro de la lavbaseno estu ne pli alta ol 915 mm. Ĉirkaŭ la lavbaseno estu breto por personaj aĵoj (dentobroso, razilo ktp). Hokoj ne estu pli altaj ol 1300 mm. Ŝaltiloj por lampoj estu facile funkciigeblaj per manoj kies fingroj ne bone funkcias. La alto de la lito estu ĉirkaŭ 430 mm. Telefono estu flanke de la lito por voki helpon se necese.
- En la kongresejo, la podio estu facile alirebla por radseĝulo. Ĉiuj kongresaj aferoj okazu sur la unua etaĝo se lifto ne haveblas. Se oni planas ekskurson, estu certe ke radseĝulo povu eniri la veturilon.

En la reklamoj por la kongreso, menciu ke almenaŭ la supraj bazaj aranĝoj estas pretaj. En la aliĝilo estu loko kie la handikapito povu indiki specifajn bezonojn.

Bv sendi viajn komentojn kaj demandojn al:
R. Kent Jones
Komisiito pri Handikapitoj por UEA
452 Aldine — Apt. 501, Chicago IL 60657, Usono

Junularaj aranĝoj

La **Junulara Esperanto-Renkontiĝo** (04.03-05) en Gödöllő, Hungario, estas la ĉefa jara aranĝo de Hungara Esperanto-Junularo, kiu dum la lastaj jaroj logis pli kaj pli da eksterlandaj partoprenantoj. La programo inkluzivas erojn movadajn, sociajn, kulturajn kaj simple distrajn: bela miksaĵo, kiu karakterizas ankaŭ ĉiujn sekvajn aranĝojn.

La fama dumpaska **Internacia Junulara Festivalo** (04.15-21) de Itala Esperantista Junularo, ĉi-jare okazonta en Torino, pritraktos la temon "Moderna socio inter magio kaj teknologio", kvankam jam en la aliĝiloj oni rimarkas pli da interesiĝo pri la unua flanko ol la dua! Por la nordeŭropaj junuloj, la samtempa **Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo** (04.17-20) lasas eblecon "plilozigi la cerbon" en pli proksima kaj intima aranĝo.

En majo venas la vico de Jugoslavio, kiu per la jam dudekokjara **Unuamaja Renkontiĝo de Jugoslavia Esperanto-Junularo** (05.01-03) kaj du sekvajnojn poste per la **Kultura Festo de Kroatia Esperanto-Junularo** (05.16-17) montras, ke ĝia movada vigleco ne limiĝas al la "plenkreskulaj" rondoj. En FR Germanio la **Marburga KISO** (06.16-22), per forta akcento ĉe la flanko de populara kulturo — fabeloj, ĵonglado, karbonpentrado, pupkonstruado ktp ktp — memorigas somermeze pri la pasinta Internacia Seminario de GEJ, kiu denove realiĝos ĉijare post Kristnasko.

La **Internacia Jubilea Semajno** (07.10-16) de Hungara Esperanto-Junularo celas esti "neformala antaŭkongreso de IJK", kaj la organizantoj aparte instigas la komitatanojn de TEJO veni por konatiĝi antaŭ la "vera" (kaj unua en du jaroj) komitatkunsido en Krakovo — kaj por partopreni la diversajn amuzajn kaj seriozajn programerojn. Poste pli ol 200-persona karavano veturos al la **Internacia Junulara Kongreso** (07.17-24), ĉefa junulara okazaĵo de la Jubileo sub la egido de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Temo de la IJK, spitante la pri-Esperantan tendencon de jubileaj aranĝoj, estas "Homo kaj civilizaciaj minacoj", kaj oni antaŭvidas ampleksan programon pri tiu temo (ja apenaŭ elĉerpebla) apud la jam tradiciaj distraj ecoj de la IJK. Poste, kompreneble, okazos amasa vagado al Varsovio por la UK, kiu celas ne nur la "oldulojn"!

La **Internacia Junulara Renkontiĝo de SAT-Junularo** (08.10-17) en Creon, Francio, espereble signas revigliĝon de la junulara frakcio de SAT; ĝia tegmenta organizaĵo en la lastaj jaroj montris akran bezonon de rejunigo. Oni proponas debatojn pri ekologio, Amnestio Internacia, Nikaragvo, la Pariza Komunumo kaj verŝajne aliaj ekstermovadaj temoj — apud la kulturaj kaj distraj programeroj. Poste oni karavanos al la SAT-kongreso en Bulonjo-sur-Maro.

Fine menciindas la bulgara **Internacia Junulara Seminario** (09.28-10.04), okazonta en la fama Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kies ĉiama devizo estas "matene lerni — posttagmeze ferii". Tio verŝajne same validas por ĉiu ajn aranĝo lokita en tiu belega ĉirkaŭaĵo. Tuj antaŭ la seminario okazos oratora konkurso "Cent jarojn Esperanto".

Krom la Internacia Junulara Kongreso kaj la Universala Kongreso, Universala Esperanto-Asocio *aŭ ĝia* Centro por Esploro kaj Dokumentado *patronas la jenajn aranĝojn:*

Scienca Interlingvistika Simpozio (Varsovio)
Internacia Scienca Simpozio (Vieno)
"Cent jaroj de Esperanto-kulturo" (Zagrebo)

Kalendaro

Internaciaj kursoj dum la tuta jaro:

- **Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando**
- **BET-Esperantotur, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando**
- **Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pk. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario**

Aprilo

01-07: **5a Internacia Metodika Seminario,** Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

03-05: **Jubilea Esperanto-Kongreso,** Amersfoort, Nederlando (C. Bossong-Singer, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven)

03-05: **Junulara Esperanto-Renkontiĝo,** Gödöllő, Hungario (Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapest)

10-13: **Jubilea Esperanto-Kongreso,** Stockholm, Svedio (Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-11138 Stockholm)

13-18: **Seminario** "Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj", Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

15-21: **Internacia Junulara Festivalo** "Moderna socio inter magio kaj teknologio", Torino, Italio (Francesco Amerio, Via G. Volante, 16, I-10133 Torino)

16-20: **47a Hispana Kongreso de Esperanto** (inkl. junulara kongreso), Madrido, Hispanio (Augusto Casquero, Atocha 98, 4, E-28012 Madrid)

17-19: **Internacia Renkontiĝo de Profesiaj Instruistoj** instruantaj laŭ la Zagreba Metodo, Zagrebo (Sljeme), Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

17-20: **Jubilea Brita Esperanto-Kongreso,** Abergavenny, Kimrujo (W. Jenkins, 14 Gelligaled Road, Ystrad Rhondda, Mid Glamorgan, Britio)

17-20: **Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo,** Losser, Nederlando (Arjen-Sjoerd de Vries, de Bongerd 8, NL-9801 AS Zuidhorn)

17-22: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 1 (pedagogio), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen, F-10000 Troyes)

17-24: **3a Printempa Semajno Internacia,** Rastatt, FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde, FR Germanio)
65a Germana Esperanto-Kongreso, Rastatt (informoj, aliĝoj kiel supre)

17-24: **2a Pedagogia Seminario** de Unuiĝo Franca por Esperanto, Lyon, Francio (E. Gallon. GEE-Seminario, 1, rue du Lac, F-69300 Lyon)

18-20: **Promenadoj** "La montaro Ĵuraso ekprintempe", Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

18-21: **42a Kongreso de SAT-Amikaro,** Vaison-de-Romaine, Francio (A. Gente, 9 av. des Erables, F-84000 Avignon)

19-25: **Internacia Renkontiĝo de Infanoj,** Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

24-26: **6a Szczecin-a Esperanto-Printempo,** Szczecin, Pollando (PEA-Szczecin, skrytka 14, ul. Armil Czerwonej 13-14, PL-70358 Szczecin)

24-26: **Amikeca Renkontiĝo de Esperantistoj,** Pécs, Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, Departementa Komitato Baranya, Pf. 2, H-7601 Pécs)

29-03: **15a Scienca Interlingvistika Simpozio,** Varsovio, Pollando (Akademia Centro Interlingvistika, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warsawa; pagu pere de UEA)

Majo

01-03: **28a Unuamaja Renkontiĝo** de Jugoslavia Esperanto-Junularo, Zavidovići, Jugoslavio (URJEJ, D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)

01-03: **Franca Katolika Kongreso,** Bagneux, Francio (s-ro Colas, 6, rue de Mézieres, F-75006 Paris)

01-03: **6a Forumo de Literatura Foiro-Kooperativo,** Poitiers, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen, F-10000 Troyes)

01-03: **Biblia Semajnfino,** Bad Wimpfen, FR Germanio (B. Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch)

03-09: **Printempa Renkontiĝo de Naturamikoj,** Dudince, Ĉeĥoslovakio (Ernesto Ván a, CS-962 71 Dudince, Slovakio)

07-08: **Kongreso de la Orienta Federacio de UFE,** Bar-le-Duc, Francio (Pol Denis, 5 Chemin de Blamecourt, F-55000 Bar-le-Duc)

08-10: **Kongresode la Centrokcidenta Federacio de UFE,** Baugé (Grésillon), Francio (B. Cheverry, 5 Résidence Dupetit-Thouars, F-49000 Angers)

08-10: **Internacia Foira Renkontiĝo** de Plovdiv kaj Solun, Bulgario (Distrikta Estraro de BEA, pere de BEA, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

08-10: **82a Skota Esperanto-Kongreso,** Coodham Conference Centre, Kilmarnock (P. Harvey, 51 Morrison Avenue, Stevenston, Ayrshire, Skotlando)

08-10: **Zamenhof Internacia Pacmarŝo,** Verőcemaros, Hungario (Budapeŝta Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 153, H-1443 Budapest)

08-10: **2a Medicina Esperanto-Renkontiĝo,** Veszprém, Hungario (István Hegyi, Veszprém MTVB Eű. Osztálya, H-8201 Veszprém)

09-10: **Kongreso de Langvedoka-Rusiljona Federacio de UFE,** Collioure, Francio (C. Gérard, 4 rue docteur Rives, F-66000 Perpignan)

09-15: **Librofoiro "Interliber"** (kun Esperanto-sekcio), plus simpozio "Turismaj libroj en Esperanto", Zagrebo, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

16-17: **Kultura Festo de Esperanto-Junularo,** Kumrovec, Jugoslavio (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)

16-17: **Konferenco de Burgonja Federacio de UFE** (kun inaŭguro de nacia Esperanto-muzeo), Gray, Francio (J. Casper, rue des Vergers, F-70100 Arc-les-Gray)

16-22: **39a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso,** Katowice, Pollando (39a IFEF-Kongreso, Slaska DOKP, Al. Rożdzieńskiego 1, PL-40202 Katowice)

18-23: **Seminario** "La Go-ludo", Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

22-24: **29a Kultura Semajnfino,** Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

23-24: **15a Renkontiĝo de Sileziaj Esperantistoj,** Opole, Pollando (PEA-filio en Opole, skr. poczt. 405, PL-45-076 Opole)

23-25: **50a Norvega Esperanto-Kongreso,** Oslo, Norvegio (NEL, Olaf Schous Vei 18, N-0572 Oslo 5)

23-30: **Internacia Ferio-Semajno de TANEF** (naturamikoj), Schoolbergen (Leuven), Belgio (G. Jacobs, Kerkstraat 97, B-3200 Kessel-Lo)

29-01: **Junulara Esperanto-Renkontiĝo** en Beskidmontaro, Bielsko-Biala, Pollando (Pawek Nowak, Pk. 30, PL-34-120 Andrychów)

29-03: **Botev-tagoj-87,** Vraca, Bulgario (kadre de la Naciaj Kulturaj Festoj; Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)

Junio

01-05: Esperanto-Printempo en Mazurio, Malinówka (Elk), Pollando (PEA-filio en Elk, pere de PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)

05-09: **79a Franca Kongreso de Esperanto,** La Gaillarde apud Frejus-St.-Raphael, Francio (Esperanto, Tour Vadon A, F-83700 Saint-Raphael)

06-07: **35a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo,** Kobe, Japanio (KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu 561)

06-08: **1-a Studsemajnfino pri Arbaro,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

07-14: **Ĉebalta Esperantista Printempo,** Mielno (Koszalin), Pollando (PEA-filio en Koszalin, pere de PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)

08-13: **3a Seminario pri Nomoj de Sovaĝaj Plantoj,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

09-13: **Internacia Kurso en Esperanto,** Nordia Popola Altlernejo, Kungälv, Svedio (Martha Andreasson, 2265 Tolsered, S-42590 Histings Kärra)

26-03: **25a Somera Esperanto-Universitato,** Gyula, Hungario (SEU, 48-as út 11, H-5700 Gyula)

27-28: **Esperanto Eisteddfod,** Dorking, Britio (Don Law, 61 Roof of the World, Tadworth, Surrey KT20 7JP)

29-17: **Somera Kursaro,** San Francisco State University, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010)

Julio

01-10: **Somera Esperanto-Lernejo,** Stambulčić-Pale (Sarajevo), Jugoslavio (SEL, D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)

01-20: **Tradiciaj 20-tagaj Kursoj por Instruistoj,** Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

02-11: **Internacia Dektaga Piedirado,** Nice, Francio (Debernardi René, 12, rue de Massingy, F-06000 Nice)

02-16: **Prelegoj kaj kursoj,** Kastelo Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, f-49150 Baugé)

03-05: **Esperanta Kultura Festo,** Londono, Britio (Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF)

03-11: **Esperanto-tendaro "Wirów-87",** Wirów (Szczecin), Pollando (PEA-filio en Szczecin, pere de PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)

04-05: **Grupa montgrimpado de esperantistoj,** Monto Triglav (2800m), Jugoslavio (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)

06-18: **Someraj Universitataj Kursoj,** Universitato de Liĝo, Sart-Tilman, Belgio (José Jakob, B.P. 62, Liege X)

09-20: **Internaciaj semajnfinaj Esperanto-kursoj** dum Universiado (universitataj sportludoj), Zagrebo, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

10-15: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 2 (recenzarto), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payan, F-10000 Troyes)

13: **Jubilea Solenaĵo** de Bulgara Esperantista Asocio (Centjara Estraro de BEA, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

14-30: **Internacia Renkontiĝo,** Kastelo Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

16-22: **Marburg KISO** (Kafoklaĉa Internacia Somera tendarO), Marburg, FR Germanio (Edlyn Teske, Am Glaskopf 19, D-3550 Marburg)

19-21: **22a Jugoslavia Esperanto-Kongreso,** Banja Luka, Jugoslavio (22a JEL-kongreso, D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)

21-27: **Junpionira Esperanto-Somero,** Montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (por geknaboj 10-15-jaraj; JES, D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)

10-17: **Lernejoj Esperanto,** Kiliántelep (apud Balatono), Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Szabadság tér 16, H-1395 Budapest)

11-17: **5a Internacia Somera Esperanto-Universitato,** Veliko Tarnovo, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Pk. 226, BG-5000 Veliko Tarnovo; ld. 06/15)

12-18: **Internacia Esperanto-Semajno,** Hanko, Finnlando (Esperanto-klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 Helsinki)

12-22: **Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj instruistoj laŭ Freinet-metodo,** Poznań, Pollando (Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F-37450 St-Cyr-sur-Loire, Francio)

13-18: **Esperanto-Feriado por Infanoj kaj Familioj,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

13-22: **20a Internacia Renkontiĝo Naturamika,** Abaliget (Pécs), Hungario (IREN, Departementa Komitato de HEA, Pf.2, H-7601 Pécs; ld. 06/25)

16-22: **Jubilea Esperantologia Semajno,** Kastelo Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

17-24: **21a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj,** Lodza Universitato, Pollando (PEA-filio en Lodzo, ul. Moniuszki 5, Pk. 337, PL-90-950 Lodz)

17-24: **43a Internacia Junulara Kongreso,** Krakovo, Pollando (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

18-22: **35a Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko,** Vaŝingtono D.K., Usono (ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530)

18-24: **Konferenco de "Monda Turismo"** kaj **3a Internacia Simpozio pri Esperanto en Turismo,** Bydgoszcz, Pollando (BET Esperantotur, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

18-25: **Jubilea Esperanto-Konferenco,** Graz, Aŭstrio (Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz)

18-25: **Renkontiĝo de Popolaj Muzikgrupoj,** Torun, Pollando (por originalaj popolmuzikgrupoj, po ĝis dek personoj; Etnografia Muzeo en Toruno, Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Torun)

19-24: **6a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco,** Krakovo, Pollando (Medicina Akademio, Katedro pri Stomatologia Protetiko, str. Smoleńsk 25, PL-31-108 Kraków

20-24: **41a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista** (IKUE), Ĉenstoĥovo, Pollando (Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio; ld. 06/15)

20-25: **Esperanto-Feriado por Infanoj kaj Familioj,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

21-30: **4a Internacia Junpionira Esperanto-Aranĝo,** Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

23-28: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 3 (ĵurnalisma grafiko), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen, F-10000 Troyes)

23-13: **Someraj Kursoj** en Kastelo Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

25-01: **72a Universala Kongreso de Esperanto,** Varsovio, Pollando (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

30-04: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 4 (historio de Esperanto; pedagogio), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen, F-10000 Troyes)

Aŭgusto

01-05: **2a Mazovia Esperanto-renkontiĝo,** Plock, Pollando (PEA-filio en Plock, pere de PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warsawa)

01-08: **Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj,** Varsovio, Pollando (PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)

01-15: **Seminarioj por Ĉe-metodaj Instruistoj,** Bydgoszcz, Pollando (Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, NL-2596 HW Den Haag, Nederlando)

02-08: **9aj Turismaj Tagoj,** Źilina, Ĉeĥoslovakio (Juraj Gondzúr, Levoćká 3, CS-010 08 Źilina)

02-05: **Internacia Scienca Simpozio** "Komunikproblemaro en internaciaj organizaĵoj" (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Jugoslavio)

02-09: **100 Jaroj de Esperanto-Kulturo** (inkl. **20a Pupteatra Internacia Festivalo),** Zagrebo, Jugoslavio (Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

02-09: **2a Internacia Ferio "Verda Stelo",** Agárd (Lago Velenci), Hungario (Klára Varga, Érc u. 4, H-1032 Budapest)

02-10: **9a Somera Studenta Esperanto-Renkontiĝo,** Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UMK, ul. Moniuszki 16/20, PL-87-100 Toruń)

02-15: **6a Internacia Feriado "Esperanto hejme",** Miedzygórze, Pollando (PEA-filio en Wroclaw, Pk. 16, PL-50-952 Wroclaw)

04-16: **Somera Esperanto-Lernejo,** Eger, Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Pf. 567, H-1395 Budapest)

06-09: **Jubilea Konferenco,** Ĉikago, Usono (Esperanto-Societo de Ĉikago, P.O. Box 1698, Chicago IL 60690)

06-11: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 5 (radiofona aktorado), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen , F-10000 Troyes)

06-11: **Esperanto-Ripoztendaro por Infanoj** (kun lingvoekzercado), Csokonyavisonta (Kaposvár), Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Pf. 567, H-1395 Budapest)

07-27: **Internacia Somera Junulara Esperantista Brigado,** Sadievo (Burgas), Bulgario (Distrikta Estraro de BEA, pere de BEA, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

08-14: **Intensaj kursoj en Esperanto** "100 jaroj de Esperanta literaturo", Barlaston, Britio (D. Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG)

09-19: **Somera Esperanto-Kurso en Lingvolaboratorio,** Szombathely, Hungario (SEKEL, Komitato de HEA en dep. Vas, Pf. 45, H-9701 Szombathely; ld. 06/30)

10-15: **Seminario** "Legindaj libroj en Esperanto ekster la beletraturo", Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

10-17: **Internacia Junulara Renkontiĝo de SAT-Junuaro,** Creon (Bordozo), Francio (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 av. Gambettta, F-75020 Paris)

10-30: **Tradiciaj 20-Tagaj Kursoj por Instruistoj,** Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

13-18: **Esperanto-Ripoztendaro por Infanoj** (kun lingvoekzercado), Csokonyavisonta (Kaposvár), Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Pf. 567, H-1395 Budapest)

15-23: **5a Dekado de Esperanto,** Uralmaŝ (Uralo), Sovetunio (Organiza Komitato, ab. jaŝĉik 67, SU-620077 Sverdlovsk)
13-30: **Lernado, praktiko, turismo** en Kastelo Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
16-23: **Feria, Amika, Börzsöny-montara Renkontiĝo Internacia,** Verőcemaros, Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Pf. 567, H-1395 Budapest)
17-22: **Seminarioj** "Lertiĝo en la tradukarto", "La Dia Komedio" kaj "Ĵurnalisma grafiko", Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
17-31: **Internacia Danuba Remado (TID'87),** Bulgario (Turisma sekcio, BEA, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
20-25: **Esperanto-Ripoztendaro por Infanoj** (kun lingvoekzercado), Csokonyavisonta (Kaposvár), Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, Pf, 567, H-1395 Budapest)
20-25: **Internacia Renkontiĝo,** Aylesford, Britio (Mollie Buckle, 53 South St., Barming, Maidstone ME16 9EX)
21-23: **74a Kongreso de Japanaj Esperantistoj,** Tokio, Japanio (Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tôkyô-to 162)
22-29: **60a Kongreso de SAT,** Boulogne-sur-Mer, Francio (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 av. Gambetta, F-75020 Paris)
30-05: **Aŭtuna Renkontiĝo de Naturamikoj,** Dudince, Ĉeĥoslovakio (Ernest Vána, CS-962 71 Dudince, Slovakio)
30-06: **5a Sanmarina Universitata Sesio,** San Marino (Akademio Internacia de la Sciencoj, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio)

Septembro

02-06: Kvalifika Kurso por Esperanto-Instruistoj, Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
02-15: **23a Ora Pola Aŭtuno,** Miedzygórze, Pollando (PEA-filio en Wroclaw, Pk. 16, PL-50-952 Wroclaw 17)
05-07: **11-a Internacia Pilgrimado,** Banneux (Liĝo), Belgio (P. Louis Bourdon, 7 av. Salomon, F-59800 Lille, Francio)
07-12: **Eŭropa Ferio-Semajno Fervojema,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
11-13: **Jubilea Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,** Olomouc, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha)
11-16: **Kvinpetalo** de Societo Yvonne Martinot, staĝo 6 (studado, turismo), Bouresse, Francio (Suzanne Bourot, 15b, rue Morel-Payen, F-10000 Troyes)
13-20: **10a Internacia Semajno de Esperanto,** Sete, Francio (Esperanto, 5 rue docteur Roux, F-34000 Montpellier)
15-19: **Interkibernetik '87** (monda kongreso de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko; Esperanto kiel unu laborlingvo), Tarragona, Hispanio (Fako pri Psikologio kaj Edukado, Centres Universitaris del Camp de Tarragona, Placa Imperial Tarraco, 1, E-43071 Tarragona)
18-28: **Internacia Seminario tra arbaroj kaj kampoj,** Velingrad, Bulgario (Esperanto-Societo de Velingrad, pere de BEA, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
19-21: **Piedira migrado** tra la montaro Ĵuraso, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
25-27: **Skota Aŭtuna Semajnfino,** Dunblane, Skotlando (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando)
25-27: **Oratora Konkurso** "100 Jarojn Esperanto", Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
28-30: **23a Kolokvo de AIMAV** (Asocio Internacia por la Evoluigo de Interkultura Komunikado), "La intereso kaj utilo de komuna interlingvo" (kun Esperanto kiel unu laborlingvo), Gento, Belgio (Fako pri Filozofio kaj Literaturo, Universitato de Gento, Blandijnberg 2, B-9000 Gent)
28-04: **Internacia Junulara Seminario,** Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Junularo, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

Oktobro

04-10: **Simpozio Internacia Interlingvistika** "Cent jarojn esperantologio", Pisanica, Bulgario (Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, p/a V. Oljanov, Pk. 66, BG-1404 Sofia)
09-11: **Esperanto-seminario de BAVELO,** Villingen-Schwenningen, FR Germanio (BAVELO, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch)
09-12: **47a Argentina Kongreso de Esperanto,** Rosario, Argentino (AEL, French 3670-B, San Vincente, RA 5006 Córdoba)
16-18: **Aŭtuna Kunveno de Bavara Esperanto-Ligo,** Bayreuth, FR Germanio (BEL, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)
16-20: **Internacia konferenco** "Esperanto en la profesio" kaj **2a Internacia Scienca Esperanto-Seminario** pri kosmaj esploroj, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario)
17-18: **5a Pariza Festivalo de Teatro kaj Kanzono,** Parizo, Francio (Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisale, F-75004 Paris)
23-26: **Internacia Seminario** "Civilizaciaj minacoj", Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP, ul. Moniuszki 16/20, PL-87-100 Toruń)
26-31: **1-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
28-30: **Internacia Scienca Simpozio "Esperanto 100-jara",** Universitato de Vieno, Aŭstrio (Aŭstria Laborkomitato "Esperanto 100-jara", Pf. 92, A-1183 Wien)

Novembro

19-22: **9a Konferenco pri Internacia Lingva Komunikado,** Lódź, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, Uniwersytet Lódzki, ul. Narutowicza 41, PL-90-125 Lódź)
27-30: **Internacia Film-foto-video-festivalo,** Pula, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 449, YU-41000 Zagreb)
28-30: **Novembra Junulara Festivalo,** Montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (NJF, Esperanto-Junularo, R. Vokica 2, Dom mladich, YU-75000 Tuzla)

Decembro

04-06: **30a Kultura Semajnfino,** Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)
06-08: **Esperantista Renkontiĝo** okaze de la studenta festo, Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
26-03: **Vintro-Feriado,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
27-03: **Vintra Esperanto-Feriado** kun lingvo-instruado, Krynica, Pollando (Pola Sudenta Esperanto-Komitato de Asocio de Polaj Studentoj, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa)
28-02: **17a Vintra Esperantista Ferio,** Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
29-02: **Novjara Esperantista Ferio,** Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
31-03: **31a Internacia Seminario,** Hanovro, FR Germanio (temo "saneco"; Germana Esperanto-Junularo, Eifelstr. 9, D-5300 Bonn 1)

Fake

● **Pedagogio:** Dum la 22a Kataluna Kongreso de Esperanto en Lleida, nov. 1986, estis anoncita la starigo de speciala premio por pedagogia agado en kaj pere de Esperanto. Tri juraj kaj fizikaj personoj rajtas kandidatigi iun homon ĝis la 31a de majo 1987, ĉe: Patronaro "Premio Petro Nuez", Apartat 32318 —, E-08080 Barcelona, Hispanio. La premio prezentiĝos dum la venonta KKE.

● En Zagrebo ekaperis Esperanto-kurso por lernejanoj, verkita de Spomenka Stimec kaj ilustrita de Ninoslav Kunc, en la lerneja revuo *Modra lasta* (La blua hirundo; eldonkvanto 120 000).



● **Filatelo:** La 4an de februaro Surinamo eldonis trimarkan serion honore al la Jubileo. La bildo montras la unuatagan koverton kun stampo. Ĉina Esperanto-Ligo lastatempe informis, ke aperos jubilea ĉina poŝtmarko la 26an de julio, aldone al tiuj en la lasta Kongresa Komuniko.

Nekrologoj

JOAO ANDRADE (1906-1987) forpasis la 9an de januaro en Volta Redonda, Brazilo. Dum pli ol 30 jaroj tie li mastris okulkuracan entreprenon "Ótica Esperanto" kaj prizorgis lokan radio-programon pri la movado.

ELLA H. GIBSON (1906-1986) mortis la 1-an de decembro 1986 en Menlo Park, Usono. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj dum pluraj jaroj delegito en Palo Alto.

ARNFINN JENSSON (1914-1986), elstara norvega esperantisto, subite forpasis en Oslo la 29an de decembro. Profesia ĵurnalisto, li gvidis la gazetaran servon de Norvega Esperantista Ligo 1935-1947; en tiu periodo li ankaŭ plenumis postenojn de ĝenerala sekretario (1935-1937) kaj vicprezidanto (1938-1947). Estis li kiu ellaboris la nunan administran sistemon de NEL. En 1945 li iniciatis la fondon de Eldonejo Esperanto A/S, kaj dum iom da tempo redaktis *Norvega Esperantisto*. Lastatempe li ne multe aktivis en la movado, sed restis fidinda fonto de scioj kaj konsiloj.

EJLER JERMIIN FROST (1913-1986) mortis fine de la pasinta jaro en Lyngley, Danlando. Li estis delegito en Klampenborg kaj fakdelegito pri vegetarismo.

JÓZSEF MÁTÉFFY (1901-1986), honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, forpasis la 4an de novembro 1986. Esperanton li ekstudis jam en 1919, kaj baldaŭ fariĝis aktivulo kaj gvidanto en la hungara movado. Post la milito li plenumis gravajn postenojn en la naciaj Esperanto-organizaĵoj, inkluzive de prezidanto de HEA en la jaroj 1965-1977. En sia profesia vivo kiel juristo kaj juĝisto, li aŭtoris ses fakajn librojn kaj multajn artikolojn ankoraŭ legatajn, kaj tiun akran vidpovon li alportis al siaj gvidaj, redaktaj kaj pedagogiaj laboroj por la Internacia Lingvo.

PETER ZLATNAR (1914-1987), unu el la plej elstaraj jugoslaviaj esperantistoj, forpasis la 7an de februaro en Ljubljana, kie dum jaroj li estis fakdelegito. D-ro Zlatnar lernis Esperanton en 1933, kaj poste estris kaj Slovenian E-Ligon kaj (de 1954 ĝis 1960) la tiutempan Jugoslavian Esperanto-Federacion. Li kontribuis redaktajn laborojn al *La suda stelo* kaj *Jugoslavia esperantisto* kaj al du libroj: *Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj* (1953 kaj *Esperanto kaj lernejo* (1959). Dum pluraj jaroj li estis komitatano de UEA, kaj atingis pionirajn sukcesojn kiel ĝia komisiito en la kampo de lerneja agado.

● **Budhismo:** Hermann Schröder, respondeculo de Budhana Ligo Esperantista, informas ke pro longedaŭra malsano li ne povas plu funkcii en tiu posteno. Se troveblas idealistoj pretaj kunlabori por reorganizi BEL, bonvolu kontakti lin ĉe Pf. 1323, D-7292 Baiersbronn 1, FR Germanio.

● **Kontraŭmalsatismo:** Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato, kun sidejo en Parizo, Francio, eldonas sian trimonatan bultenon *Monda Solidareco* en kvar lingvoj, inkluzive de Esperanto kiel sia oficiala lingvo. La Fonduson fondis grupo de mondcivitanoj en 1982, kaj ĝi nun havas membrojn en pli ol 23 landoj. Ĝiaj fundamentaj principoj estas nete ekologiaj: mutualismo kaj federismo, tutmondismo, celado al memstareco anstataŭ senĉesa ekonomia kreskado, ktp. Por pliaj informoj aŭ abonoj (12 FF jare) kontaktu ĝin ĉe 15 rue Victor Duruy, 75015 Paris, Francio.

● **Verkistoj:** De la 10a ĝis la 17a de majo okazos en Lugano, Svislando, la 50a Internacia Kongreso de PEN, la internacia verkista asocio. La organiza komitato de tiu kongreso, per propra spontana decido, intencas dediĉi programeron al la Esperanta literaturo, kadre de la ĉi-jara temo de "limlandaj verkistoj" (iom plilarĝigita!). Por pliaj detaloj — aparte se oni estas PEN-ano — kontaktu d-ron Tazio Carlevaro, Via Alberto di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona, Svislando.

LA MEMBRARO DE UEA en 1986

Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	0	3	3
Alĝerio	0	4	4
Andoro	0	1	1
Angola	0	1	1
Argentino	272	74	346
Aŭstralio	138	116	254
Aŭstrio	244	50	294
Bangladeŝo	0	2	2
Belgio	742	267	1009
Benino	0	3	3
Bermudo	0	1	1
Bocvano	0	1	1
Bolivio	0	1	1
Brazilo	694	263	957
Britio	835	341	1176
Bulgario	5110	98	5208
Burundio	0	1	1
Centrafrika Resp.	0	2	2
Ĉeĥoslovakio	3527	148	3675
Ĉilio	30	12	42
Ĉinio	1129	67	1196
Danlando	230	95	325
Ebura Bordo	0	5	5
Egiptio	0	1	1
Ekvadoro	0	1	1
Finnlando	492	232	724
Francio	519	611	1130
Gabono	0	2	2
Gano	0	3	3
Germana DR	400	23	423
Germanio FR	879	480	1359
Greklando	440	33	473
Gujano	0	1	1
Haito	0	2	2
Hinda Unio	0	33	33
Hispanio	900	184	1084
Honkongo	0	6	6
Hungario	3080	205	3285
Indonezio	0	4	4
Irano	0	101	101
Irlando	50	18	68
Islando	52	45	97
Israelo	270	67	337
Italio	1206	236	1442
Jamajko	0	1	1
Japanio	1020	386	1406
Jordanio	0	1	1
Jugoslavio	1105	197	1302
Kamerunio	0	1	1
Kanado	270	120	390
Kolombio	30	31	61
Kongo	0	2	2
Korea Resp.	424	39	463
Kostariko	0	2	2
Kubo	100	44	144
Libio	0	1	1
Luksemburgio	96	10	106
Madagaskaro	0	1	1
Malajzio	0	2	2
Malto	50	7	57
Maroko	0	2	2
Maŭricio	0	1	1
Meksikio	4	18	22
Mongolio	0	3	3
Nederlando	290	408	698
Nepalo	0	6	6
Niĝerio	0	5	5
Nikaragvo	0	4	4
Norvegio	323	90	413
Nov-Zelando	67	79	146
Pakistano	0	12	12
Papuo-Novgvineo	0	1	1
Peruo	15	4	19
Pollando	6790	167	6957
Portoriko	0	2	2
Portugalio	295	29	324
Reunio	0	3	3
Rumanio	0	26	26
Ruando	0	6	6
Salvadoro	0	1	1
Sanmarino	0	1	1
Senegalio	0	1	1
Singapuro	0	1	1
Sirio	0	1	1
Sovetunio	0	83	83
Srilanko	0	5	5
Sud-Afriko	46	23	69
Sudano	0	1	1
Svazilando	0	1	1
Svedio	1134	379	1513
Svislando	120	144	264
Tajlando	0	3	3
Tanzanio	0	1	1
Togo	0	4	4
Tunizo	0	2	2
Turkio	0	3	3
Un. Arabaj Emirl.	0	1	1
Urugvajo	0	3	3
Usono	319	413	732
Vatikano	0	1	1
Venezuelo	24	29	53
Vjetnamio	0	8	8
Zairio	149	14	163
Zambio	0	1	1
104 landoj	**33910**	**6679**	**40589**

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO STATISTIKO DE UEA POR **1985** KAJ **1986**

Kategorio	**1985**	**1986**
Membro-Gvidlibro	0	409
Membro-Jarlibro	1255	1267
Membro-Abonanto	3859	3692
Dumviva Membro	967	957
Honora Membro	26	28
Juna M-Jarlibro	200	164
Juna M-Abonante	229	162
Individuaj Membroj	**6536**	**6679**
Aligitaj membroj	23754	24546
Junaj Al. Membroj	9266	9364
Membroj entute	**39556**	**40589**
Societo Zamenhof	147	184
Abonoj Esperanto	272	233
Kolektivaj ab. Eo	1150	1175
Abonoj Kontakto	409	389
Kolektivaj ab. Kto	894	1144
Patronoj de TEJO	75	72
Kotizoj entute	**42503**	**43786**

Unuafoje super 40 000!

Post plurjardeka ŝvebado super 30 000, la membronombro de UEA fine rompis la magian limon de 40 000: sume 40 589 membroj en 1986, t.e. je 1033 pli ol en 1985. Bela eniro en la Jubilean Jaron! Neniam UEA estis tiel amasa, sed ni studu la ciferojn sen kontento, por ekĉasi la limon de duona centmilo.

La rekordo rilatas nur al aligitaj membroj. Jam 30 jarojn aĝas tiu de individuaj: 7542 en 1957. UEA lastafoje superis 7000 en 1973. Ke la nombro en 1986 estis je 143 pli ol en 1985, ŝuldiĝas al la eksperimenta kat. MG; aliaj grupoj, krom MJ, malkreskis. La sperto de 1986 ne tre realigis la originalan ideon de MG, nome pli vastan eniron de UEA por esperantistoj de la Tria Mondo kaj nepagipovaj landoj. Ĉu valoras la kroma, neekonomia laborŝarĝo pro MG, aŭ ĉu pli racie ni atingos la celon per plia redukto de la MJ-kotizo en la koncernaj landoj?

La malkresko ĉe iuj kategorioj parte okazis, ĉar ni en la Centra Oficejo ne estis en stato revarbi inter nepagintoj. Aliflanke, gvidantoj de TEJO pripensu, kial MJ-K kaj MA-K ŝrumpis per kvarono. Kial UEA, kaj TEJO aparte, ne altiras junularon?

Kion fari? Pli energie varbi por plifortigi la organizan bazon de nia komuna UEA. Ju pli granda iĝas UEA, des pli pezas ĝia vorto ankaŭ ekster la Movado. La nombro de aligitaj membroj montras grandajn eblojn de kresko ĉe IM. Ĉiu povas kunrompi rekordojn: varbante en la klubo, donacante membrecon al amiko en nepagipova lando. Ni kreu indan statistikon pri la Jubilea Jaro! **ob**

Oficiala Informilo

KOREKTO: ALIGITAJ MEMBROJ
Pro eraro en cirkulero al la Landaj Asocioj ni reatentigas, ke la kotizo por aligita membro estas kvindekono (1/50) de la MA-kotizo por la koncerna lando.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
D.J. Gould, Aŭstralio; César de Mosteyrin y Castillo, Hispanio; D. Ederveen, Nederlando.

PATRONOJ DE TEJO 1986
Belgio: Elfriede Ernst. Hispanio: Ada Fighiera-Sikorska. Italio: Clara Gubbioli Carioli.

DONACOJ 1987 (gld.)

ĝis la 28-a de februaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: M.Ellyard 180,00; T.M. Metherall 50,40. Belgio: D. Dupont 100,00; K. Lődőr 40,00. Britio: E. Fowden 70,00; I. Tritton 30,00. Danlando: A. Birkbak 200,00; E.V. Mortensen 100,00. Finnlando: L. Oterma 100,00; J. Toropainen 110,70; Y. Hiltunen 106,95; A. Kuhanen 46,70; L. Tiusanen 210,70; M. Lahtinen 40,00. Francio: Y. Nicolas 70,25; A. Amice 100,00; M.Sujet 15,00; M. Turin 50,00. F.R. Germanio: T. Sinno 58,03; P. Holdgrün 183,75. Israelo: J. Giladi 25,00. Italio: M. Franzoni 100,45; C. Gubbioli 50,00. Japanio: M. Takamori 100,00. Jugoslavio: Z. Mukenauer 12,40; B. Levaĉiĉ 45,00. Kanado: J. Smythe 50,00. Luksemburgio: C. Nourmont 97,50. Nederlando: W.P. Roelofs 100,00; J.C. v. Veenendaal 100,00; W. v.d. Blink 100,00; N. Reinders 70,00; W. Roelofs 100,00; R. Moerbeek 50,00; L. Adelaar 50,00; N.L. Daams 200,00; K.A. Riemersma 50,00; W.C. Keizer 50,00; R.H. Bossong 100,00. Norvegio: L. Bøe 50,00. Novzelando: D.J. Langman 50,00. Svedio: Esp.-Kurso de Boden 141,75; S. Johansson 100,00; T. Johansson 100,00; N.E. Johansson 210,00; G. Bojnar 100,00; S. Lindblom 55,20. Svislando: G. Jehle 100,45; C. Piron 100,00. Usono: M. Kennedy 100,00; J.M. Atkinson 148,75. Venezuelo: M. Bachrich 50,00. Anonime 50,00. Div. malgrandaj 15,20. Sumo ĉijara: 4684,18.

FONDAĴO CANUTO: Aŭstralio: M. Warr 52,05. Belgio: K. Lődőr 40,00. Britio: O. Rossetti 150,00; I. Tritton 10,00. Finnlando: I. Helsingius 159,25; O. Kouhia 12,49; A. Romonen 10,71; A. Kuhanen 40,00. Francio: M. Sujet 15,00. Israelo: J. Giladi 25,00. Japanio: T. Tadaisi 92,05; Y. Sanô 25,20. Jugoslavio: T. Sekelj 100,45. Nederlando: F. Zeiler 70,00; G. v. Gijn 100,00; R. Moerbeek 50,00; Frisa Esperantista Rondo 50,00; J. Nikolov 145,25; W.C. Keizer 50,00; R.H. Bossong 100,00; E.J Woessink 401,80. Nov-Zelando: D.J. Langman 50,00. Svedio: S. Johansson 220,95. Svislando: C.C. Georget 20,39. Usono: M. Kennedy 68,30; M. Degenhardt 33,86; H.E. Reed 100,00; D. Maxwell 131,45; R. Blaine 148,75. Venezuelo: M. Bachrich 50,00. Anonime 50,00. Sumo ĉi-jara 2572,95.

ĈINIO: F.R. Germanio: Ges-roj Kondor 468,30. Nederlando: N. Reinders 70,00; R. Moerbeek 127,70; Anonima 100,00. Sumo ĉi-jara 766,00. (Tiuj ĉi donacoj por Fond. Canuto estas aparte destinitaj por membrigi ĉinojn.)

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Britio: Grimsby Esperanto-Societo 29,74. Sumo ĉi-jara 29,74.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Hispanio: Maria Pi Maynar 200,00. Venezuelo: M. de Lourdes Schenkel 40,53. Sumo ĉi-jara 240,53.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: M. Warr 40,00. Britio: O. Rossetti 60,00; E. Fowden 70,00; C.A. Shrives 50,45; V.B. Atkinson 80,00; H.D. Palmer 313,34; K. Gilmore 87,75. Danlando: B. Larsen 105,20. Finnlando: E. Anttola 100,00 Francio: A. Amice 100,00; M. Sujet 15,00. F.R. Germanio: G. Schmitt 33,60; M. Gründler 39,38; B. Krüger 79,05. Irano: A. Azari 25,20. Israelo: J. Giladi 50,00; M. Burŝtin 50,00. Italio: A. Taccani 83,80; T. Taccani 83,80. Japanio: Y. Tabuti 210,00. Jugoslavio: B. Levaĉiĉ 33,10. Nederlando: Harlema Esp.-Grupo 87,25; G. Ellerman 60,00; N.L. Daams 184,40; Y. Weidema 38,00; G. Waterbolk 200,00; W.C. Keizer 100,00. Norvegio: L. Boe 50,00. Nov-Zelando: M.M. Aagaard 100,00. Sud-Afriko: B. Arciero 50,45; G.A.D. Thornton 50,45. Svedio: J. Snarberg 100,45; M. Dörr 200,00; M. Andréasson 75,00; A. Nilsson 306,20; M. Svensson 85,95. Svislando: B. Ghaznavi 10,00; H. de Sassi 13,39; W. Schaufelberger 29,45. Usono: M.L. Barkley 273,35; E. Eddy 48,75; P.E. Cook 37,21; W. Heller 100,45; D.B. Swets 53,10; W.L. Worrell 163,80; W.P. White 48,75. Diversaj malgrandaj 29,40. Sumo ĉi-jara 4205,97.

JUBILEA JARO: Aŭstralio: L. Eddington 511,00; L.V. Scott 100,45; B. Scott 100,45. Belgio: K. Lődőr 40,00. Britio: E. Semaska 10,00; A. Lawson 210,70; I. Tritton 10,00. Danlando: E.V. Mortensen 100,00; A. Birkbak 144,40. Finnlando: E. Heikkinen 217,00; T. Sormunen 200,00; R. Sabelli 100,45. Francio: M. Sujet 15,00; R. Lemaire 350,00; M. Challulau 105,20. F.R Germanio: T. Sinno 58,02. Israelo: J. Giladi 25,00. Japanio: M. Takamori 84,10. Jugoslavio: T. Korhecz 35,20. Nederlando: W.P. Roelofs 100,00; N. Reinders 70,00; G. van Gijn 101,60; L. Adelaar 150,00; R. Ruig 84,30. Norvegio: E. Matland 100,00. Nov-Zelando: E-Lymburn 362,25; M.M. Aagaard 50,00. Svedio: I.M. Lindkvist 545,50; T. Johansson 100,00; G. Olsson 25,70. Usono: M. Zarchy 148,75; E.C. Pollock 163,80. Sumo ĉi-jara 4418,87.

PROPAGANDA KONTO: Finnlando: K. Ekman 175,00. Sumo ĉi-jara 175,00.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: K. Lődőr 40,00. Britio: R. Rossetti 210,00. Danlando: E.V. Mortensen 100,00. Finnlando: L. Oterma 200,00; A. Kuhanen 40,00; M. Lahtinen 30,00. Francio: M. Sujet 15,00. F.R. Germanio: H. Frank 100,45; B. Frank 50,45. Israelo: J. Giladi 50,00. Jugoslavio: B. Levaĉiĉ 45,00. Kolombio: G. Mathieu 50,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00; W. v.d. Blink 100,00; R.H. Bossong 120,00. Usono: S.S. Culbert 247,45; W.P. White 100,00. Venezuelo: J.E. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara 1623,35.

FONDAĴO TEJO: Aŭstralio: Y. Einihovici 100,00. Belgio: K. Lődőr 40,00. Britio: E. Fowden 70,00; Grimsby E.-Societo 29,74; I. Tritton 30,00; M. Brearley Carowne 16,70. Finnlando: S. Hämäläinen 210,70; A. Mehtonen 54,00. Francio: M. Sujet 15,00. F.R. Germanio: M. Weichert 11,85; B. Frank 50,00. Israelo: J. Giladi 25,00. Nederlando: W. Roelofs 101,60. Norvegio: A. Balsvik 126,70; O.J. Rønnevig 100,00. Nov-Zelando: M. Armit Cooper 362,25. Svedio: B. Haraldsson 26,60; S. Lindblom 50,00. Usono: E. Eddy 100,00. Anonima donaco 270,00. Sumo ĉijara 1790,14.

FONDAĴO WÜSTER: Finnlando: L. Oterma 200,00. Kanado: B.R. Crisp 19,87. Usono: M. Degenhardt 33,86. Anonime 1127,50. Sumo ĉi-jara 1381,23

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Britio: C.A. Shrives 50,00; J. Brayshaw 12,70. Finnlando: L. Oterma 100,00; V. Hämäläinen 210,70; A.L. Asikainen 68,80; J. Toropainen 100,00; P.J. Anttola 220,00. Francujo: M. Sujet 15,00; L. Roy 234,15. Israelo:J. Giladi 50,00. Italio: L. Franzoni 100,45. Japanio: F. Kamachi 210,70; K. Kimura 100,45. Jugoslavio: B. Levaĉiĉ 45,00. Norvegio: L. Boe 100,00. Nov-Zelando: M.M. Aagaard 100,00. Svedio: B. Bengtsson 160,30. Usono: W. Hultberg 148,75; S.A. Estling 261,10; H.E. Reed 48,75; T.O. Brace 76,30. Venezuelo: J.E. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara 2513,15.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**

GERMANA LITERATURO EN ESPERANTO

****

La eldonejo ARTUR E. ILTIS (Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) prezentas al vi:

BÜCHNER, Georg: **Lenz**. Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1895. 26 p. 6,-- DM

BÜRGER, Gottfried August: **Lenore. Lenora.** Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1984. 25 p. 4,50 DM

BUSCH, Wilhelm: **Max kaj Moritz. Buba rakonto en sep petoloj.** Trad. Franz Döring. Saarbrücken 1984. 57 p. 6,60 DM

EICHENDORFF, Joseph von: **Tri noveloj.** Trad. Reinhard Haupenthal. Würzburg 1985. 184 p. 27,-- DM, bind. 39,-- DM

FABRY, Philipp W.: **Die Islamische Republik. La islama respubliko.** Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1984. 35 p. 6,-- DM

GOETHE, Johann Wolfgang von: **Ifigenio en Taŭrido.** Trad. L.L. Zamenhof. (Repr. de la eld. Paris, Berlin 1908.) Saarbrücken 1982. 116 p. 14,50 DM

GOETHE, Johann Wolfgang von: **Das Tagebuch. La taglibro.** Trad. Kálmán Kaloscay. 2. eld. Saarbrücken 1984. 19 p. 4,50 DM

GOETHE, Johann Wolfgang von: **La suferoj de la juna Werther.** Trad. Reinhard Haupenthal. Heckendalheim 1984. 92 p. bind. 39,-- DM

GRIMM, Jacob kaj Wilhelm: **Elektitaj fabeloj.** Trad. K. Bein. (Repr. de la eld. Berlin 1906.) Saarbrücken 1985. 199 p. bind. 27,-- DM

HARIG, Ludwig: **Die Harmonie der Widersprüche. La harmonio de la kontraŭdiroj.** Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1979. 43 p. 6,-- DM

HAUFF, Wilhelm: **La longnazulo.** Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1980. 36 p. 7,50 DM

HEINE, Heinrich: **La rabeno de Bañarañ.** Trad. L.L. Zamenhof. (Repr. de la eld. Paris 1924.) Saarbrücken 1984. 47 p. 4,50 DM

HEINE, Heinrich: **La rabeno de Bacherach**. Trad. Reinhard Haupenthal. Düsseldorf 1985. 42 p. 9,90 DM

LESSING, Gotthold Ephraim: **Fabloj.** Trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken 1985. 41 p. 9,90 DM

* * *

Revendistoj, mendantaj ĉe la eldonisto, ĝuas rabaton de 33 % ekde tri ekzempleroj.

Mendu ĉe: Esperanto-Centro, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn

M. Führer, Am Stadtpfad 11, D-6236 Eschborn 1

Detalaj katalogoj haveblaj ĉe la eldonejo.

Laŭ kontrakto inter UEA kaj la Eldonejo de la Universitato de Kembriĝo (Britio), ni anoncas la aperon de

VETERO KAJ KLIMATO DE LA MONDO

Denis Riley kaj Lewis Spolton

en Esperanta traduko de Kris Long.

Temas pri renoma popularscienca verko, kies anglalingva originalo spertis jam plurajn eldonojn kaj represojn. La libro estas tre riĉe ilustrita (pli ol 150 mapoj, diagramoj, tabeloj kaj fotoj). Provizita de indeksoj, ĝi multrilate plugas novajn kampojn en la Esperanta terminologio.

Vetero kaj klimato de la mondo (1974), Denis Riley kaj Lewis Spolton. El la angla trad. Kris Long. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1987. 132p. Ilus. 25cm. ISBN 92 9017 035 2. **Prezo: 28,50 gld.** (por Nederlando, 30,21), plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Fokuso

Kvaronjara popularscienca magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

Someraj Universitataj Kursoj

organizas Sesion de la 6a ĝis la 18a de julio 1987 en la belega kadro de la Universitato de Lieĝo en Sart-Tilman. 4 temoj antaŭvidataj: lingvistiko, sociologio, stereografio kaj ekologio.

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj. Eblas partopreni plurajn sekciojn. Loĝado kaj manĝado surloke en la Universitato. Vizitoj kaj kromprogramoj antaŭvidataj. Aliĝu rapide kaj petu informojn al:

José Jacob, Sekretario de S.U.K.,
B.P. 62, Liège X, BELGIO.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:
Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

Jugoslavia Esperanto-Ligo Kroatia Esperanto-Ligo Universala Esperanto-Asocio

"100 jaroj de Esperanto-Kulturo"

ZAGREB 2-9 AŬGUSTO 1987

11 TEATRAĴOJ — 8 PUPTEATRAĴOJ — KONCERTOJ DE E-MUZIKO — AMPLEKSA EKSPOZICIO PRI ESPERANTO — ESPERANTO EN TV, FILMO KAJ RADIO — SCIENCA SIMPOZIO — FOIRO DE ESPERANTAĴOJ — VILAĜA FOLKLORA FESTO — MULTAJ EKSKURSEBLECOJ DUM KAJ POST LA ARANĜO

Kial ĝuste prikultura aranĝo okaze de la centjariĝo? Kaj ĉu hazarde en Zagrebo? Ĉu la esenco de nia movado ne estas ĝuste kultura misio realigata per neŭtrala lingvo? Kio ja estas niaj ĉefaj atingaĵoj se ne ĝuste la kulturaj: literaturo, tradukoj, libroj kaj lingvo mem? En kio ja konsistas la ĉefaj celoj de la Movado se ne en lukto por nova kultura ordo en la mondo? Jen la kialoj kiel celebri la centjariĝon guste kulture. La aranĝo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo" en Zagrebo tial klopodas prezenti al la partoprenantoj la reprezentan retrospektivon de la kulturaj atin- goj de la Movado en lastaj cent jaroj kaj diverstipajn frandaĵojn kultur-artajn en Esperanto kadre de la riĉa kaj varia programo. Estu certaj ke en Zagrebo regos la etoso hejma por ĉiuj esperantistoj kaj sentiĝos la reeĥoj de nia jam centjara tra dicio. Krome gi estos rekta postkongresa plidetaligo de la Varsovio temo kun aparta akcento je la rolo de Esperanto en pliproksimigado de naciaj kulturoj. La urbo Zagrebo certe kapablos plenumi sian rolon: longjara Esperanto-centro kun pluraj societoj, radio-elsendo, teatra grupo, eldonejo de libroj kaj revuoj kaj miloj da esperantistoj: nepre vizitinda loko por ĉiuj kiuj troviĝas tiumondparte. Ankaŭ vi ne preterlasu la okazon viziti ĝin. La Informa Bulteno kun la detala programo de la Aranĝo, distraj kaj turismaj programoj kaj la aliĝilo, estas senpage havebla ĉe la organizanto:

Kroatia Esperanto-Ligo YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/1 Jugoslavio.

Bonvolu atenti, ke ĝis la 31-a de majo 1987 validas speciala rabato por la loĝado.

B. KATOLIČKI FAKULTET KUL